

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr.95, junio 2011

"Nia sklaveco devenas de fakto ke ni subiĝas al la jugo de mensogo kaj ne senmaskigas ĝin kaj ne protestas kontraŭ ĝin ĉiutage".

(Lazer Shantoja, la unua albana esperantisto el la jaro 1907)

Adreso: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio

Tel. ++355682580758

Rete: bselimi@yahoo.com

Enhavo

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

Jubileo de la Albana Esperanto Ligo: Memoroj de Gjergji Gusko

Ni dankas

Mesaĝoj el ILEI estraro

Omaĝe al Dom Lazer Shantoja-pioniro de Esperanto movado en Albanio

Metodiko: la vorto de la tago

Informaĵoj

Kunvenoj, kaj aliaj

Nia propagando

Fondaĵo Evidente kaj aliaj

Beletraĵoj

Vojaĝimpresoj

Fragmento el la romano „La nokto de Ustika“ Petro Marko

Anekdotoj

Artikoloj pri Albanio kaj albanoj

P u b l i c i t a ĵ o j s u r l a r e v u o M O N A T O

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

Nia jubileo

Miaj memoroj pri Esperanto

Gjergji Gusho, Pogradec

Gjergji_gusho@yahoo.com



Estis la jaro 1957 kiam mi aŭdis unuafoje pri la lingvo Esperanto. Tiam mi studis en la univeristato de Tirana en la fako de la rusa lingvo.

Unu tagon alvenis ĉe ni por prelegi la inĝiniero Ĉefo Fico kiu parolis pri Esperanto. En la halo estis studentoj de nia fako same tiuj de la fako de la albana lingvo kaj beletro. Li konatigis nin kun la historio de la lingvo kaj ties kreinton, la polon Ludvig Lazaro Zamenhov, kiu publikigis ĝin en la jaro 1887.

Interalie s-ro Fico diris ke la ideo pri la internacia lingvo estis disvastigita precipe dum la dua duono de la 19-a jarcento, kiam la internacia asocio de lingvistoj, kunfrontiĝante la malfacilaĵojn de la komunikado inter la homoj de la diversaj nacioj, alvokis por internacia helpa mondlingvo. La evoluo de la ekonomio, industrio, komerco, kulturo, arto ktp postulis la kreiĝon de unusola interlingvo. Ĝi devus esti simpla, facila kaj samtempe riĉa.

Multaj lingvistoj sin okupis per tia projekto sed sensukcese. Nur Ludvig Zamenhov sukcesis. Poste inĝ. Fico alportis multajn ekzemplojn kaj karakterizaĵojn gramatikajn de ĉi tiu nova lingvo.

Ĉiuj studentoj aŭskultis la prelegon atente kaj interesplene. Multaj el ni deziresprimis eklerni tuj la lingvon mirindan. Tiutempe la sola fremdlingvo instruata en niaj lernejoj estis la rusa..

Du jaroj poste, revenis el Bulgario mia pliĝa frato, finstudinta tie. Li kunportis ankaŭ lernolibron de Esperanto por bulgaroj, kies aŭtoroj estis Ivan Saruhov kaj Simeon Hesapĉiev. Estis eldono el la jaro 1957 kaj ĝi enhavis 25 lecionojn, same duvojan vortareton bulgara-esperanta kaj esperanta – bulgara.

Mi tralegis la libron kaj komencis studi per ĝi. La bulgara estas simila al la rusa, tial ne estis malfacile por mi orientiĝi en ĝi. Paralele, mi verkis vortareton esperanta- albana kaj albana – esperanta. Ĉi tiuj vortaretoj ege helpis min poste por legi diversajn aliajn librojn en la lingvo Esperanto.



Plurajn jarojn pli poste, dum mia vojaĝo al Tirana, mi vizitis la nacian bibliotekon tie kaj interesiĝis pri la esperantaj titoloj en ĝi. Ekzistis kelkaj tiaj kaj mi notis ĉiujn. Poste mi mendis tiujn librojn el la biblioteko de Pogradec. Interalie, estis la libroj “La tuta Esperanto” de Henrik Seppik, “Esperanto aŭtodidakte” de Andrey Childs ka.

Post la jaro 1991, estis fondita la Albana Esperanto Ligo. Tiel ni havis la eblecon ekkomunikiĝi kun fremdaj esperantistoj. Inter ili, estis unu ruso, unu italo, unu svedo, unu franco, kiuj alsendis min ankaŭ librojn. La korespondo intermpiĝis post la jaro 1997. Same mi korespondis tiutempe kun la forpasinta esperantisto albana Zef Mjeda.

Dume, mi partoprenis internacian aranĝon esperantistan en Francio. Tio okazis en Nante, en la jaro 1998. Estante pensiulo oni helpis min per pago de vojaĝ kaj restad elspezoj.

Same por mia filino Entela, esperantistino. La temo de la 13-a Ekumena Esperanto Kongreso estis “Rekonciliado kaj Toleremo en la interrilatoj de la homoj apartenantaj al diversaj eklezioj”.

La kongreso estis organizita okaze de la 400-jara datreveno de la fama “Edikto de Nante”, celinta tiutempe reconciligi la homojn de diversaj ekleziaj sektoj, katolikojn kaj protestantojn de Francio, kiuj, ĝis tiam, multe kvereliĝis kaj interbatalis.

En ĉi tiu kongreso oni forte kritikis la kverelojn kaj la militon okazinta tiutempe en Irlando, kie katolikoj kaj protestantoj eĉ bruligis la preĝejojn de unu la alia.

En la mia interveno mi parolis pri la brila interreligia solidareco kaj toleremo karakterizanta mian popolon, kiu antaŭ ĉio surmetas la interesojn de la nacio mem. Unuiĝinte, la albanoj militis kontraŭ diversajn fremdajn invadintojn, otomanaj, faŝistaj. Mi sciigis ankaŭ pri la miksaj geedziĝoj inter junuloj apartenantaj al diversaj religioj. Estas unu vilaĝo, nomata Lura, nordoriente de la lando, kie la duono de la loĝantaro estas katolika kaj la cetero islama. Tie oni geedzigas kutime inter ambaŭ religiaj familioj. Se la novedzino naskas du gefilojn, unu el ili konvertiĝas al katoliko, la alia al islamano. La tria gefilo fariĝas katoliko, la kvara islamano, ktp.

Mi menciis ke en la distrikto de Lezha, ekzistas jam pratempa preĝejo el la 1-a jarcento, nomata la “Kirko de Sankta Maria” en Kallmet, ĉar mem Paŭlo vizitis niajn teritoriojn dum lia rondvojaĝo al Romo.

Mi konvinkis la ĉeestantojn pri la fakto ke ĉe ni mankas kiu ajn fundamentalismo religia. Eĉ dum la otomana periodo la albanaj virinoj ne kovris sian vizaĝon kaj ĝenerale la islamo ne influis en la vestoj de albanoj.

Albanoj islamanaĵoj konsumas ĝenerale ankaŭ alkoolaĵojn kio estas malpermesite de Kurano.

Mi konkludis mian paroladon per la jena rakonto de iu mulao el Kosovo, nomata Idriz:

Idriz kaj lia kolego estis vizitante Romon, kie la moskeoj estas raraj. Ili bezonis preĝi sed la plej proksima moskeo estis tre fore. Tial ili decidis eniri katolikan preĝejon kaj petis permeson de la ties pastro eniri kaj preĝi tie. La pastro konsentis iel mirigite, sed la du mulaoj eksplikis al li ke ne gravas kie oni preĝas, ĉar *ĉuj preĝejoj estas ja la domoj de Dio.*

Simile okazis ankaŭ en la vilaĝoj albanaj kie la plimulto apartenis al unu religio kaj la ceteraj enkaze de bezonoj por religiaj servoj (entombiĝo, ks) petis por tiucelo la vilaĝan pastron de la alia religio.

Post la jaro 1991 mi instruis ankaŭ Esperanton al pluraj miaj gestudentoj en la mezlernejo. Miaj amikoj sendis iliajn gefilojn ĉe min por eklerni la lingvon same. Tiucele mi preparis lecionojn kiujn mi tajpis en mia skribmaŝino kiu aperigis ankaŭ la ĉapelitajn literojn, poste mi multobligis ilin kaj disdonis al la gestudentoj.

Sed baldaŭ la intereso de gestudentoj ŝanĝis sian direkton: ĉiuj strebis jam al la aliaj “grandaj” lingvoj, angla, germana, itala, kiujn ili komencis ellerni en la privataj pagataj kursoj. Kompreneble Esperanto apenaŭ utilis al ili por daŭrigi la universitatajn studojn eksterlande, kio estis granda deziro plurajn jarojn. Fakte unu studento mia de la esperanta lernokurso aliĝis al la Studumo en Bydgoszcz de Polando kie Esperanto estis uzata kiel laborlingvo. Li skribis al mi ke li estas tre kontenta ke jam ellernis Esperanton kio estas nun por li tre utila.

Kiel multaj esperantistoj ankaŭ mi ĉiam revis ke nia lingvo disvastiĝu tre rapide en la mondo kaj ĝin akceptu ankaŭ la registaroj. Sed bedaŭrinde tio ankoraŭ ne okazis pro diversaj kialoj:

Unue, ekde 60 jaroj, oni praktikas ĉefe la anglan kiel internacian lingvokomunikilon. Des pli tio plifortiĝis post la kolapso de la eksa socialisma tendaro.

Due, pro ekonomiaj kialoj. Oni konsideras ankoraŭ la lernadon de Esperanto kiel luksaĵon.

Dume mi aŭdis ke Britio enspezas almenaŭ 20 bilionojn da eŭroj ĉiujare danke al la instruado de la angla al la eŭropaj neangloj, same Aŭstralio enspezas 10 bilionojn danke al la aziaj gestudentoj lernantaj la anglan tie.

Mi opinias ke estus tre utile ke Esperanto movado ekhavu sian sidejon en unusola lando kie agadu ankaŭ ĝiaj institucioj: “ministrejoj”, “direktorejoj”, ks, do fondiĝu ia ŝtato, kio cetere estas ankoraŭ ia utopio. Kiom bone estus se mem Eŭropa Unio adoptigus Esperanton kiel internacian helplingvon ene de si mem, same kiel la angla estas la oficiala lingvo de USONO. Oni enkonduku devigan instruadon de Esperanto en ĉiuj lernejoj kaj utiligu ĝin por defendi ankaŭ la diplomojn en la universitatoj.

Ni dankas

Ni dankas samideaninon Martha Otto kiu pagis 24 eŭroj por la kotizo de nia sekcio por la jaro 2011.

Rita Permeti

Ni dankas la redakcion de la revuo “Etnismo” kiu en la numero 87, 2011 aperigis artikolojn ankaŭ pri Albanio kaj albanoj. Nome en la paĝoj 2-11 oni parolas pri la vizito de gesinjoroj Moritz en Albanio, Kosovo, Makedonio, septembre 2011. En la paĝoj 16-21 estas publicita la tuta konversacio de s-ro Moritz kun la altrangulo de la ministerio pri la eksteraj rilatoj s-ro Qirjako Qirko, je temo “Etnaj minoritatoj en Albanio kaj albanoj ĉirkaŭe”

Shaban Hasani

Diplomo

Lastatempe Internacia centro pri kulturo kaj turismo internacia centre en Bydgoszcz liveris al nia sekciano Bardhyl Selimi la jenan diplomon, pro vigla aktiveco favore al la studado per kaj por Esperanto

Dankon,



Nehat Sokoli

El la mesaĝoj de ILEI estraro

- Resumo pri la ekzamenoj UEA/ILEI en la periodo 1989-2000 estas aperigita.
- Gvidilo por Rerezentantoj estas aldonita.
- Nova sekcio pri la liga Historio estas starigita kun deko da dokumentoj en la jaroj 1987-1992.
- Protokolo de la skajpa estrarkunsido de la 3a de marto aperis.
- Listo de partoprenontoj por nia 44a ILEI-konferenco en Kopenhago kaj skiza programo estas rigardeblaj. Plus renovigita enkonduka teksto pri konferencoj.
- La laulanda tabelo de nia membraro en 2009 kaj 2010 estas afishita.
- Taskaroj prezidantaj kun rekontrolo aperis por januaro kaj februaro.
- Komitata historio estas rekonstruata – legeblas protokoloj el 2001, 2005 kaj 2006.
- Teksto pri projekto 'esperanto125' aperis sub 'Agado / Projektoj'.
- Informo pri senpaga PDF-legilo estas aldonita al la nova sekcio 'Helpiloj'.

ILEI figuras en Revuo Esperanto

La aprila numero bone prezentas nian Konferencon kaj la Simpozion per artikolo de nia komisiito kaj estrarano Radojica Petrovic. Tion sekvas artikolo de la prezidanto pri la projekto 'esperanto125', sekve tio estas internacie lanchita.

Komitato voĉdonis

Finighis meze de marto la lasta fizika voĉdono de nia komitato, necesa pro la manko de kvorumo en Matanzas. La plenaj rezultoj aperos baldaŭ en la rejeto. Plej interesaj decidoj: La financaj kaj estraraj raportoj pri 2009 estas akceptitaj kaj la estraro sensharghita por tiu jaro. La alighpeto de Serbio estas akceptita, do ni bonvenigas tiun novan landan sektion. Regularo pri reta voĉdonado de la komitato estas akceptita, tiel ke ILEI povas multe pli regule audi la voĉojn de siaj sekcioj.

Estrarkunsido

La estraro ILEI kunsidos inter la 15a kaj 18a de aprilo 2011 en Roterdamo, partparalele kun la estrarkunsido de UEA. Poste hodiaŭ ni sendos al vi la malnetan tagordon por tiu kunsido. La kunsido estos kvoruma – la estraro laste kunsidis kvorume en novembro 2009, same en Roterdamo.

Juna amiko presata; IPR presota

La unua numero de nia revuo por lernantoj kaj lernejoj por 2011 aperos en la sekvaj tagoj – malscertas ĉu eblos ekspedi la numeron antaŭ la estrarkunsido. IPR 2011/2 estas en preparo, kun limdato por kontribuajhoj je aprilo 15. Du-tri paghoj restos malfermaj ĝis la 20a de aprilo por akcepti raporton pri la estrarkunsidaj decidoj. IPR do aperos maje, kun ĝi estos dissendita la nova varbilo de ILEI.

Efektive, plena monato da laboro kaj pluiro.

Stefan MacGill
Prezidanto, ILEI

Ni omaĝas

Lazer Shantoja la unua albana esperantisto

(El la jaro 1907)



La pastro kun la piano

(Je memoro al la pastro esperantista Lazer Shantoja)

Noto: oni ne scias multe pri la agado esperantista de Lazer Shantoj sed aliaj esperantistoj estas konfirmita ke li estis verŝajne la unua kiu alportis Esperanton en Albanion almenaŭ en la jaro 1907. Certe li tion eklernis dum la studado en Austrio, en la universitato de Insbruck.

Lazer Shantoj naskiĝis en la urbo de Shkoder en la jaro 1892. Dum lia junaĝo la onklo-pastro orientigis lin al la profesio de la pastro. En la Seminario de Jezuitoj li ricevis solidan kulturen preparon kaj studis la grekan, la latinan kaj la italan lingvojn. Li sin distingis aparte en la kampo de la lingvoj. Dume li konatiĝis kaj influigis de la beletra movado aperinta de la albanaj renesanculoj. Por Lazer tiaj figuroj kiel la jezuitaj instruistoj, patroj Ndre Mjeda, Anton Zaroni kaj Mark Bazhdari-servis kiel modeloj.

Oni sendis lin en Insbruck de Austria por studi filozofion kaj teologion. Tie li lernis legi, skribi kaj paroli flue la germanan lingvon.

Finstudinte li nomumiĝis kiel pastro en kelkaj preĝejoj montaraj apud Sheldija. Tiu prospera kaj agrabla regiono estis ne tre fore de Shkoder. Tial li ofte transportis tien per mulo sian pianon, kvankam la vojo trapasis kelkajn malfacilajn terenojn montarajn. Pro tio la lokanoj vokis lin “la pastro kun piano”.

En la jaro 1924, ĉefepiskopo Lazer Mjeda, la frato de la jezuita poeto patro Ndre Mjeda, alvenis de Skopje ekokupi la vakantan postenon en Shkoder. Li estis homo je forta volo, je alta morala staturo kaj eksterordinara forvidkapableco. La energio de Mjeda estis multmema. Li entreprenis baldaŭe la rimedojn necesajn por levi la civilan statuson kaj civilan povon de la katolika loĝantaro. Li apogis politikece la agadon de Luigj Gurakuqi, la katolikan fondinton kaj la gvidanton de la Kristian - demokrata partio. Multaj muslimoj aliĝis al tiu partio poste.

Ĉefepiskopo Mjeda instigis la kulturan iniciatemon de la civitanaro difinante Shantoja-n kiel sian personan sekretarion. La poeto alvenis en Shkoder kune kun siaj libroj kaj piano. Dum la vesperoj li ofte ludis per piano en la ĉefepiskopa palaco. La muziknotoj de Schumann kaj Schubert enverŝiĝis de la supraj fenestroj sur la placon de la katedralo kaj penetris al la ĉefaj stratoj apude. La civitanoj ariĝis dumnokte por spekti la improviziajn koncertojn. La hazardaj preterpasantoj haltis por ekĝui kaj admiri la muzikon elirinta el la fenestroj de la palaco.

En la jaro 1923, ekaperis la oficiala ĵurnalo de la kristian-demokrata partio, ORA E MALEVE, (La defendanto de la montoj). Baldaŭe poste, la ĉefepiskopo komisiis al Shantoja “partopreni aktive” en ties kompilado. La ĵurnalo ekĝuis imediatan kaj eksterordinaran sukceson. Tre vaste cirkulata ĵurnalo dissemis demokratiajn ideojn tra tuta albana socio kiu ankoraŭ estis enprizonigite de la konceptoj anakronikaj kaj mezepokaj.

Shantoja eniris en la politika konkuro kun la tuta sia ardo de kapriĉa temperamento. Li montris tamen pli da spiriteco kaj stilo de artisto ol tiom da pasio de la partia membro. Estis ĝuste tiu ardstima temperamento kiu eksplodis en brilaj, polemikaj aludoj frapintaj la legantojn, entuziasmigintaj la amikojn kaj incitintaj la malamikojn.

La ĵurnalo rapide famigis lin kiel verkiston. Liaj kurtaj prozaj paragrafoj kaj incitaj, korodaj kaj satiraj versoj estis skribite per kortremiga stilo kaj populara humuro. Ilin oni akceptis per avida intereso. Liaj verkaĵoj tro plezurigis lin. La artikoloj pri kriticismo socia kaj politika malkovris ĉe Shantoja la intencon por regeneri la spiriton de sia popolo. Zorgema kiel vera kredanto kaj kun neskuebla volo, li strebis plenumi sian devon al la lando.

Shantoja dediĉis ĉiun linion de siaj verkoj al la spirita leviĝo de la albana popolo. Malfeliĉe, albanoj dum la jaroj 1920-1930 ankoraŭ ne atingis nivelon necesan de la politika matureco, nek povis kompreni tion kion sugestis al ili la noveculoj. Plejparto de albanoj ne atentis al la alvokoj por pli bonaj metodoj de la regado kaj la atingo de pli altaj sociaj niveloj.

La ekzila periodo

Kiam enfalis la registaro de Bishop Fan Noli decembre 1924, la vakuon plenigis politikistoj kontraŭintelektualaj, malamikaj, helpe de fremdaj mercenaroj. Shantoja aliĝis al la aliaj verkistoj kaj intelektuloj kiuj preferis ekzili. Li vivis en Jugoslavio dum kelkaj jaroj, poste iris al Vieno kaj al Berne, Svisio. Li akiris postenon de germanparolanta kapelano en katolika Berna preĝejo. Pli poste li iris al La Motte same kiel kapelano, famiĝante pro siaj preĝoj en la franca.

Nenia malama impulso instigis lin partopreni la aktivecojn politikan en Albanio. Ĉi lastaj entenis ardajn emociojn kaj patriotajn pensojn nutritaj per la freŝeco kaj idealismo de neniam fininta adoleskanteco.

La verkaĵoj de Shantoja, eĉ tiuj konsiderataj malfidindaj, incitis admiron ĉe liaj malamikoj pro sincereco kaj lojaleco per kio ili estis inspiritaj, kaj ĉar la ĉagreno de la ironio de Shantoja ĉiam estis lumigite de la moviganta eleganteco de ties formo.

La rara sentebleco de Shantoja apogis sur lia solida kultura fono, liaj scioj pri la grandaj eŭropaj lingvoj kaj majstreco de sia patrina lingvo.

La poeto plurestis malfermite al plej variaj manifestacioj de la vivo kaj ĉiam montris amon al la popolo, muziko kaj sporto.

Shantoja frekventece grimpis la montojn de Albanio, Austrio, Svisio kun ununura dorsosako sur ties ŝultroj kaj alpinista bastono enmane. Ŝajnis ke li estis antaŭvidite forlasi la "mega-laboron" malkovrante sian kreativan geniecon, sed malfeliĉe tion li neniam faris. Lia memoraĵo konserviĝas nur en kelka prozo mallonga sed escelenta kaj kelkaj noblaj lirikaj poemoj.

La sonetoj de Shantoja rezignas de ĉiu formo de la surtera amo, tamen ili enviciĝas inter la plej belaj albanaj poemoj iam dediĉitaj al virinoj:

Fragmento el la poemo "Por unu sola kiso"

IV.

Enterigita kadavro ekde longe en abismo
De la ondegma maro estas ja mia amo
Neniam la suno ĝojigis lin eĉ dum la sonxgoj
Kiel subrideto de fantomoj iufoje

Pala iomtempe, briletis kaj kantis iamfoje
Kaj suno kaj rozoj kaj distraĵoj
Estis ŝiaj kanzonoj nur trembriloj
De flamo inter bluaj krizantemoj.
en la tombejo dumnokte...Do kia venteto en fremda tero
kaŝema persvadas la foliojn fleksiĝi
la kapojn ripozi en la aspirita nokta krepusko.

En la mistikon de la tristaj versoj?
Ĉu oni kliniĝas sur ĝin provante subaŭskultante?
En la kvieto de la nokto mi apenaŭ povas verson verki.

V.

Ah! Ne demandu de mi tiun verson!..Estas pli bone
Ke viaj vermoj ne sciu kion diri
Esti poetoj sed ne liberaj
Buŝkantante kiam ploras la malfeliĉulino

Tiel estas ja la vivo. Per adiaŭo
La liron kiun mi prenis por vi, nun volas forlasi
Ĉar ties drato, o mia floro, malfacile tremas
Kiam alian eĥon ne havas krom unu voĉon.

Floriĝu vi denove! Mi sen amo la vivon
Pasigas nun, sola inter la poetoj

Kaj rememorante la iutagan kison,

vian kison – ekzilon...mi nun prikantas
la plej belan version al diino Afrodito
inter ombroj de cipresoj kiam foriros...

Ne, ne demandu de mi tiajn versojn.
*La destino malpremasas. Kvankam vi venenigas
Ĉi tiun poeton, ankoraŭ liaj lipoj devas fermati.
Liaj kor-kanzonoj ŝanĝiĝas al larmojn.*

*La liron per kiu mi volis gajni vian honoron
Mi lasis surplanken. Ĝi ne povas tremi pro ĝojo
Se vi ne estos la strebo de miaj deziroj
krom nur abstrakta diino kaj Muzo.*

*Alies florojn tamen. Mi, tenante mian vivon disde
la amo, pasigos miajn tagojn, sola inter poetoj,
Rememorante la kison kiun vi donis al mi.*

*En mia ekzilo mi levis la himnon de la ĝojo
Al Afrodito pasos de generacio al generacio
Ekster la ombroj de la cipresoj.*

Post 15 jaroj en ekzilo, Shantoja bezonis la inspirigan aeron de la patrolando kaj renovigon de la kontaktoj kun samnacionoj, cele al verkado. Atendante la permeson returni patrien, li tradukis verkaĵojn de Goethe, Schiller kaj de diversaj italaj poetoj. Dume, li verkis ĵurnalajn artikolojn kaj poeziaĵojn kiuj aperis en la ĵurnalo de liaj kunekzilintoj. La finajn jarojn de ekzilo restis sufokite ĉe li la deziro ekvidi la verkon kiu sendube konfirmus lian artisman geniecon kaj certigus al la vastmondan konatiĝon kiel beletra skolulo.

Rehejmiĝo

Finfine Shantoja estis permesite reveni hejmen en la jaro 1940. Dum tiu periodo konfuza, maltrankvila kaj angoreca, la eventoj kunprenis lin kiel ŝtormo. Li loĝigis kun sia patrino en malgranda domo en Tirana kie li intencis labori paceme kun liaj libroj kaj notoj. Tamen en la jaro 1944 oni arestis lin, enĵetis en teruran prizanon, kaj turmentis lin. Post kiam liaj kaptintoj rompis al li la ostojn en la korpomembroj, li “paŝis” sin apogante sur liaj kubutoj kaj genuoj. Kiam oni permesis al la patrino viziti lin, ŝi vidis lin en stato tia kiom ŝi petegis la prizonigintojn “Mortigu lin. Faru tiun bonecon al li! Ne lasu lin suferu plu!”

La nepriskribelaj kruelaĵoj eltenitaj de Shantoja reduktigis lin en staton kvazaŭmortan. Fine, unu virino soldato komunista, mortpafis lin sur kolo. Lia korpo estis enterigite preter alia okdejarulo islama ekleziulo Sulĉe Bej Bushati en iu kaŝita tombo. Sulĉe bej

Bushati reprezentis la tuton de la albanaj noblaj tradicioj. Li estis posteulo de la Domo de Princoj kiu regis la nordan Albanion duonsendepende dum la “Alta Pordego” reĝimo de Kostandinopolo (Istanbul). Enterigante la pastron kaj la mulaon kune, la komunistaj neigantoj de Dio kaj de la Patrio memtrompiĝis kredante ke ili forlasis en forgeso la radikon de la albanaj tradicioj kaj la ties branĉetojn revivigotajn.

Multaj homoj miras kial la komunistoj turmentis la poeton tiamaniere. Post lia returniĝo en Albanion, li ne plu involviĝis en politikaj aferoj. Fakte, li evitis ĉiujn kurentojn agintaj en la lando dum la periodo 1941-1943.

La sola ekspliko por la barbara traktiĝo de Shantoja estis ke la albanaj komunistoj estis veraj anti-okcidentemaj kaj anti-kristanaj. Ili malamis la pastron pro ties subteno normala de la naciaj tradicioj kaj pro ties promociado de la “pura” esenco de la okcidenta civilizo, miksite kun la veraĵoj de kristanismo.

La kultura emajlo de la okcidenta civilizo kiu briletis en sia prozo kaj liriko, incitis kaj timigis la komunistojn. Ili vidis ĉe li antikomunistan instrumenton kiu tutfacile povus enpenetri la junajn korojn.

Multaj gejunuloj ĝuis kaj adheris la stilon de Shantoja. Ĝi estis edukita esence per la etna likvaĵo, sed esprimita per tre moderna ŝlosilo kiu harmoniigis elegantece la suferon kaj humoron. Li scipovis kiel esprimi per vortoj la tipe sarkasman vejnon de la albana raso markita per la okcidenta humoro. Liaj kelkaj sed ekzemplecaj verkoj lokigis lin en la ĉeftorento de la albana beletro, tuj post la plej rafinita albana stilisto Faik Konica (1875-1942).

Anekdoto kun Shantoja

Veturante al Scienca Esperanto aranĝo en Svedion, Dom Lazri alvenis iom prokraste kaj ne trovis lokon en hotelon. Li sin prezentis al la policejo kaj petis helpon. Tie oni ofertis tranokti en unu libera ĉelo de la policejo. Lazri akceptis kaj tiel eniris la ĉelon. Oni portis al li manĝon. En la ĉambro estis lito, tableto kun tirkestoj, banejo, ŝranko kun diversaj libroj kaj revuoj. Morgaŭon, post kiam oni alportis lin denove manĝon. Lazri eliris dirante al la oficialuloj de la policejo ke “se en Albanio ekzistus tia prizono je komforteco al averaĝa hotelo, li volonte enirus ĝin por verki tie trankvile!

Enesperantigis: Bardhyl Selimi

Metodiko

La vorto de la tago

PROFESIO

Ĉiu okupo, per kiu oni akiras vivrimedojn:

Mi deziras komenci la profesion de instruisto.
Li estas profesia aktoro.
Ŝi faras sian laboron tre profesie.

Mia patro profesias kiel kuracisto.
Mi scias multajn profesiulojn, kiuj povus helpi al ni.

PREMIO

1. Rekompenco, donacata al la plej indaj:

Mia filo ricevis la unuan premion.
Jam komenciĝis disdono de la premioj.
El la dudek konkursaj desegnaĵoj oni premios nur tri.

2. Donaco proponata al aĉetantoj aŭ abonantoj, por stimuli eblajn klientojn:

Aĉetante komputilon vi ricevos premion!

KONFLIKTO

1. Kontraŭdiro inter posedo kaj neposedo, inter diverĝaj aspiroj kaj intereso, esprimiĝanta en agado de sociaj grupoj:

La reĝo ne sciis, kiel solvi la konflikton.
Denove konfliktantaj partioj ne sukcesas interkonsenti.
Mi volas konflikti kun neniu.

2. Malkonsento, kaŭzita de kontraŭeco de deziroj aŭ opinioj:

Ja vi scias, ke tio estas konflikto de intereso!
Mia kapo estas plena de konfliktaj pensoj.
En mia laborejo estiĝis laborkonflikto.

KURAĜA

Ŝi ĉiam tenas sin kuraĝa kontraŭ atakoj.

Post "teni sin" mi atendus "antaŭ" atakoj, mi ne scias kial, eble ĉar "teni" rilatas pli restadon ol movon, sed mi vere ne scias. Temas nur mia lingva sento (ĉu pure esperanta, ĉu influita de la denaska), kion vi opinias?

Mi sentas nuancon inter "kuraĝa kontraŭ atakoj" kaj "kuraĝa antaŭ atakoj". En la unua mi vidas eltenadon kaj en la dua bataladon. Oni uzas kaj "antaŭ" kaj "kontraŭ". Ĉu iu kuraĝas klopodi klarigi la nuancon?

Kiu kritikas kuraĝe, mem agas malsaĝe.

Ĉu? Ĉu proverbo? Mi pensas pri tiuj kiuj kritikis sian registraron en lokoj kie tio estas malfacila afero ...

Kuraĝa mieno antaŭ propra kameno.

Tiun mi ne komprenas ... Kion signifas ĝi?

> Via konduto estas tro kuraĝa, mi pensas.

Rilate al troa kuraĝeco, mi ŝatas la rimarkon en Revo[1]:

Rim.: Kuraĝa ago estas pripensita de la intelekto kaj decidita de la volo; maltima aŭ aŭdaca ago povas esti senpripensa, eventuale malprudenta efiko de memfidemo aŭ de individua temperamento. Kuraĝo estas virto kaj laŭdinda kvalito; maltimo aŭ aŭdaco povas esti troa aŭ mallaŭdinda eco.

SOBRA

1. Modere trinkanta kaj manĝanta:

Post la festo li devis veturi, pro tio li volis resti sobra.
Kion sobreco deziras, ebrieco ĝin diras.
Vi devas sobriĝi!

2. Evitanta ĉiajn superfluaĵojn:

Mi ŝatas tiun ĉi libron pro la sobra stilo de la aŭtoro.
La apartamento estis sobre dekoraciita.

3. Senpasia, senpartia, singarda pri siaj emocioj:

Mi esperas, ke vi estas sobra homo kaj ne faros stultaĵojn!
La proksimiĝanta danĝero tuj sobrigis lin.

SCIENCO

1. Sistema tutaĵo de scioj, bazita sur metoda racia esploro kaj celanta eltrovon de leĝoj de la naturo aŭ de la homa socio:

Scienco konstante progresas.
Scienco havas semon enuan, sed frukton bonguan.
Sciencistoj faris esplorojn rilate malpurecon de aero.

2. Tutaĵo de la metodoj, hipotezoj, teorioj kaj scioj pri difinita fako:

Mi ĉiam ŝatis ekzaktajn sciencojn.

Ĝi estas por mi ĥina (ĉina) scienco.
Li legas sciencajn revuojn.
Ŝi interesiĝas pri natursciencoj.
Ne demandu scienculon, demandu spertulon.

IDEALO

La plej alta perfekteco, kiun oni povas imagi, sed neniam plene atingi:

Konstanta paco estas plej nobla idealo de la homaro.
Ŝi estas ideala edzino.
Mi tro idealigis lin kaj pro tio poste senreviĝis.
Li estas idealisto, li ĉiam strebas al idealo.

OKUPI

1. Teni en posedo iun lokon aŭ tempon; daŭre lokiĝi ie:

Mia skribaĵo okupas tri paĝojn.
Okupi sen celo lokon sub ĉielo.

2. Ekokupi:

Malamikoj okupis nian urbon.
Mi ne scias, kiom longe daŭros la okupado.
Okupantoj ne intencas forlasi nian landon.

3. Tiri al si la atenton, intereson, aktivecon de iu:

Ŝi okupis ĉiujn liajn pensojn.
Nun mi estas okupita, bonvolu ne ĝeni min.
Denove vi okupiĝas pri bagateloj!
Li havas nenian okupon nuntempe - li estas senokupa.
Dancado estas mia ŝatokupo.

MISTERO

Fakto, afero kaŝita aŭ neklarigebla:

Lia morto ĝis nun restis mistero.
Iu mistera forto venigis min ĉi tien.
Ŝi ĉiam kondukas tre mistere.
Mi vidas neniun misteraĵon en tiu ĉi kontrakto.

KVERELI

Kolere kaj brue disputi:

La gepatroj komencis kvereli inter si.
Mi ĉiamaniere provis pacigi ilian kverelon.
Li ekkverelis kun aliaj knaboj, ĉar tiuj ofendis lin.
Mi ŝatas ŝin, ĉar ŝi ne estas kverelema persono.

KOLERI

Senti fortan agitiĝon de la psiko, kaŭzata de ofendo aŭ nekontenteco, kaj tion eventuale montri vorte aŭ fare:

Mi tre koleras kontraŭ vi, ĉar vi ne konservis miajn sekretojn!
Kolero montras malsaĝulon.
Virino kolera pli ol hundo danĝera.
Vi kolorigis nin per viaj faroj.
La patro koleregas, ĉar vi ne obeis lin.
Li estas tre (ek)kolerema kaj ekscitiĝas ĉe la plej malgranda bagatelo.
Patrino parolis per kolereta voĉo.

AFABLA

1. Kondutanta plaĉivole kun agrablaj vortoj kaj komplezo:

Ĉu vi ne volas esti tiel afabla kaj helpi al mi trovi la vojon?
Apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla.
Dankon pro via afableco, kiun vi montris al mi.
Vi estis tre malafabla al via patrino!

2. Plaĉa pro la montrata bonvolemo aŭ komplezo:

Mi kun plezuro akceptis ŝian afablan inviton.
Afabla vorto pli atingas ol forto.
Kiu agas afable, vivas agrable.
Evidente ŝi ne ŝatas min, ĉar ŝi rigardis al mi malafable.

2. Facile uzebla por nesperta uzanto:

La programo estas tre afabla.

AGRABLA

Plaĉa kaj plezuriga:

Vi estis tre agrabla al mi!
Agrabla estas gasto, se ne longe li restas.
Estas tre agrable, ke vi vizitis min.
Li faris multe da agrablaĵoj al mi.
Ŝia agrableco min tre plezurigis.
Ni ĉiam provas agrablighi nian vivon.
Subite ni ekaŭdis malagrablan voĉon.

KLERA

Kapabla, per ĝusta uzado de akiritaj scioj, klare juĝi kaj bone taksii la aferojn:

Li estas ne nur klera, sed ankaŭ tre bona homo.
Sciencon oni ne mendas, klarecon oni ne vendas.
Tiu instruisto klerigas nin pri matematiko.
Mi multe laboris por mia kleriĝo.
Ŝi ne volas amikiĝi kun malkleruloj (senkleruloj).

INTIMA

1. Ekzistanta tute interne, ne aperanta ekstere; nepublika:

Al neniu mi rakontas pri miaj intimaj sentoj.
Mia vivo estas intimaĵo.
La afero estas intime konata.

2. Karakterizata de profunde komunaj sentoj kaj plena konfido kaj senĝeneco:

Niaj interrilatoj estas intimaj.
Pli bona amiko intima, ol parenco malproksima.
Ili vivas en intimeco.
Amiko - intimulo.

TRONO

1. Ceremonia seĝo de reĝo aŭ alia suvereno, ordinare ornamita kaj altigita:

La reĝo sidis sur sia trono.

Ne atingos krio ĝis la trono de Dio.

2. La reĝa aŭ suverena povo:

Li perdis sian tronon.
Dio tronas en la ĉielo.
La angla revolucio detronigis Karolon la 1an.
Oni volis surtronigi tute alian homon.

PREMI

1. Apliki forton sur objekton en kontakto, malvastigante la spacon okupatan de ĝi, aŭ puŝante ĝin ĝis senmoviĝo:

Ne premu ĉi tiun butonon!
Najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas.
Mi elpremis sukcon el la fruktoj.
Enpremi en la teron.
Ŝi trapremis terpomojn kaj faris kaĉon.

2. Fari tiun agon kiel esprimon de sento:

Li premis al mi la manon.
Ŝi etendis la manon por manpremo.

3. Ĝeni, suferigi, kvazaŭ per troa pezo:

La laboro min premas.
Malfeliĉo komuna estas malpli premanta.
Mi cedis al la insista premo de amikoj.
La koro premiĝas vidante tiun situacion.

4. Repuŝi per superaj rimedoj:

Ili premis la malamikojn.
Alpremi iun al muro.

5. Tirane, maljuste traktadi:

La malriĉuloj estas premataj en nia lando.
Li subpremis la homojn.

TIRANO

1. En Helenio, homo, kiu uzurpis la absolutan regpovon en iu civito, kaj kies aŭtoritato posedis nenian religian karakteron:

Dionizo estis tirano.

Li regis tirane.

2. Regnestro, kies povo estas senlima kaj ĝenerale kruela:

Oni malamas la tiranojn.
Li havis tiranan povon.
Li tiranis tutan landon.

3. Ordonema kaj senindulga mastro:

Mia estro estas vera tirano!
Sklavo kun forta mano estas plej granda tirano.
Lia tiraneco transiris la limojn.

UZURPI

Senrajte proprigi al si bienon, povon aŭ titolon:

Li uzurpis la tronon.
Homoj protestas kontraŭ uzurpado de iliaj rajtoj.
Lia uzurpatora agado elvokis protestojn.

BRIDO

Rimenaranĝo ĉirkaŭ la kapo de rajdo- aŭ tir-besto, por ĝin konduki kaj gvidi:

Li lasis al ĉevalo la bridon sur la kolo (ne plu gvidis ĝin).
Riĉeco sen gvido kiel ĉevalo sen brido.
Bridu vian buŝon!
Mi malbridis la ĉevalon.
La verkisto havis nebrideblan fantazion.
Mi estis ŝokita, kiam mi ekvidis lian senbridan koleron.
La senbridigita popolo komencis fari malordon en la lando.

(<http://vortaro.brazilo.org/vtf/>)

Informaĵoj

Jubileo de la STUDUMO Bydgoszcz

Mi pardonpetas pro mia longa silento, sed aprilaj 36 Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kun 37 AKB/AIS-Sesio bezonis multan tempon.

Nun jam finiĝis la 20-a studjaro 2010/2011 ĉe Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (ISTK), kiu estas nun registrita kiel Centro de Konstanta Edukado kaj de 1996 jaro funkcias ankaŭ kiel

Klerigejo de Akademio Internacia de al Sciencoj – AKB/AIS, kio ebligas por niaj studentoj akiri titolon de bakalauro kaj magistro de AIS. Tie - en ISTK/AKB dum pli ol 20 jaroj (1991-2011) ni instruas pere de Esperanto turismon kaj kulturon, ebligas preparon por labori en 9 profesioj i.a. kiel lektoro, instruanto kaj kursgvidanto de Esperanto (n-ro de profesio 235910).

Diplomojn de ISTK rekonis Pola Ministerio de Edukado la 1.08.2000 j. (Dz. U. nr 70 poz. 824 – Registara ĵurnalo). Dum pli ol 20 jaroj en ISTK studis en Esperanto pli ol 1000 gestudentoj, el kiuj kelkcent atingis ankau titolojn de bakalauro kaj magistro de AIS kaj kelkcent ankau diplomojn por instrui Esperanton. Niaj absolventoj laboras ne nur en Pollando kaj Europo, sed ankau en Afriko, Ameriko, Azio kaj eĉ Australio kaj Novzelando.

En pasinta jarcento ĉefe studis ĉe ISTK polaj gestudentoj eĉ ĝis 200 po jare, en la nuna la pli multaj estas afrikanoj kaj azianoj. Estas fakto, ke por ili estas pli malfacile lerni Esperanton, tamen pluraj el ili eklernas ankau la polan lingvon.

Bedaurinde situacio ŝanĝiĝis. Poloj preskau ne studas ĉe ISTK, ĉar similaj studoj pri turismo estas jam senpagaj kaj ĉe ISTK necesas pagi. Ĉefe aliĝas afrikanoj kaj azianoj, sed viza diskriminacio flanke de Shengen-landoj dauras. Por studjaro 2010/2011 aliĝis rekorde pli ol 130 gestudentoj, sed sukcesis veni al ISTK nur pli ol 10. Pluraj – almenau 30 ne ricevis vizojn por studi kaj ni denove invitas ilin por la studjaro 2011/2012 sen aldona studadkotizo, pri aliaj ni eĉ ne scias kial ne venis, ĉar Konsuloj estas suverenaj kaj ne bezonas informi, kiuj ricevis vizon kaj kiuj ne. Parte tamen kulpas studentoj, kiuj ne plene respektas vizopostulojn de Pollando, ekz. necesas peti vizon plej malfrue 45 tagojn antau la vojaĝo au finiĝo de la vizo; nun necesas havi krom malalta studadkotizo 200-400 Euroj au USD por la tuta studjaro, ankau po 300 USD au 250 EUR po monate por vivi en Pollando. Verŝajne estas ankau studentoj, kiuj malgrau ricevo de la vizo ne venas al ISTK, do, misuzas niajn inviteleterojn. Ankau Konsuloj ne ĉiam volonte donas vizojn, ĉar tutjara studado en Pollando kostas ĉ. 2000 Euroj, nia – nur 200-400 Euroj, do, 5-10-oble malpli, kio ne plaĉas al Polaj Konsuloj. Se ni aligus la studadkotizojn, verŝajne neniu aliĝus, same, se ni volus instrui nur Esperanton. Estas tre malfacile konkurenci kun aliaj lingvoj, ĉefe kun angla, kiu regas en turismo. Tamen ne valoras rezigni kaj valoras kontraŭbatali la vizan diskriminacion kaj ne kaŝi kapon en sablo.

Po semajne ni realigas 30-40 studleciojn (45 minutaj), po tage 6-8. Plej ofte po du lecionoj laŭvice, kiuj estas dediĉitaj al lernado de turismo, kulturo kaj pola lingvo – ĉiuj pere de Esperanto. Ni prilaboris studadprogramojn por lerni Esperanton kaj ankau por studi

turismon kaj kulturon pere de Esperanto en nia AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB). Ili estas presitaj kaj estas troveblaj en niaj retpaĝoj www.esperanto.bydgoszcz.eu. Ĉiujare ni proponas al ISTK-gestudentoj ĉ. 800 lecionojn, do, ĉ. 100 kursoj 8-lecionaj kun 800 lecionoj ĉiujare.

Por bakalaŭriĝi ĉe AIS necesas akiri dum tri studjaroj 150 STU (studunuoj – kursoj almenau 8 horaj = 1200 lecionoj) kaj por magistriĝi, dum pliaj du jaroj same 150 STU, do, kune 300 STU = almenau 2400 lecionoj, ĉefe en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj. Pluraj el niaj ISTK/AIS gestudentoj aperas en E-movado, ekz. Małgorzata Komarnicka (PL) – sekretario de ILEI, Olga Kovyazina (UA) – nuna estraranino de TEJO, Katarzyna Marciniak – nuna oficistino de CO de UEA.

Samtempe similajn demandojn havas Dorothy Holland – redaktoro de Bulteno de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, tial permesu, ke la samajn informojn mi sendas al ŝi. Mi sendas ankaŭ al senatanoj de AIS, ĉar ne ĉiujn faktojn ili konas, ekz. pri viza situacio.

Mi esperas, ke la informoj helpas al Vi ĉij kompreni kaj fine helpi al disvolvo de Esperanto en faka instruado, kion bondeziras

Andrzej Grzębowski

Ŝtate agnoskita Esperanto-klerigkurso en Germanio

Granda sukceso por Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI, germana sekcio de ILEI), Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg (ICH), klerigejo de GEA:

Inter 21- 25 marto 2011 okazos "Esperanto-klerigferiado" en Herzberg - la Esperanto-urbo.

La kvardekhora kurso de la regiona popola altlernejo estas oficiala klerigoferto por plenkreskuloj. La Esperanto-kurso konsistos el 5x8 lernhoroj. Tion postulas la leĝo. Eble en la sesdekaj jaroj de la lasta jarcento sub gvido de rektoro Helmut Sonnabend (iama prezidanto de ILEI), okazis la lasta ŝtate agnoskita Esperanto-trejnseminaro en Germanio.

Normalkaze nur ampleksaj politikaj seminarioj, kursoj de la angla lingvo, specialaj komputilkursoj (ekz. por profesia librotendado) estas ofertataj laŭ "klerigferioleĝo". Do, por la faka programo detale ellaborita de Zsófia Korody kaj Peter Zilvar la regiona popola altlernejo petis permeson de la klerigministerio en Hanovro (federacia lando Malsupra Saksio). Post iom da prokrasto la "klerigferiado" ricevis la ŝtatan agnoskon.

Jen kelkaj trajtoj de tia agnoskita seminario, kurso:

- dungitoj havas la rajton unufoje en la jaro peti unusemajnan "klerigferiadon" por agnoskitaj seminarioj kaj ĉe agnoskitaj institucioj. Ili devas peti la specialan laborforpermeson sufiĉe frue
- la labordonanto devas pagi la normalan salajron
- tiu klerigperiodo ne forprenas la regulajn feriotagojn
- la labordonanto devas aldoni la partoprenatestilon al la personaj aktoj de la laboristo
- tia intensa lingva kurso servas ankaŭ kiel pruvilo pri baza kono de fremdlingvo
- pro tio, ke ĝi estas oficiala ŝtata kurso, oni rajtas peti redukton de imposto pro la kostoj de veturo, tranoktado, manĝoj, partoprenkotizo, ktp.

La unika "Esperanto-klerigado" okazos sub gvidado de Zsofia Korody venontsemajne. La direktoro de la popola altlernejo (KVHS Osterode), sinjoro Rüdiger Brakel malfermos la oficialan Esperanto-sesion. Ni plu informos pri la eventoj, pri la rezulto.

Korajn salutojn de

Zsofia Korody

komisiito de GEA por instruado
prezidanto de AGEI (germana ILEI)
estrarano de ILEI

La Londona Esperanto-Klubo

Ni havas seriozajn aferojn por diskuti. Internacie, Esperantistoj diskutas pri la nuna stagnado de la Esperanto-movado. Ili parolas pri mistera kverelado en multaj landoj. Dume, la Esperanto-movado kolapsas dum la moŝtuloj lasas al ĝi kolapsi sub si.

En Britio la kverelado daŭris de post 1994, kiam Will Green ekŝiĝis kiel Honorofica Sekretario de Esperanto-Asocio de Britio. Nur en 2006 mi trovis leteron en kiu li klarigis la kaŭzon de sia ekŝiĝo: obstaklado kaj financa kaŝado. Intertempe multaj entuziasmaj Esperantistoj provis bone kontribui al la porEsperanta agado, sed unu post alia ili estis blokitaĵoj. La Esperanta Parlamenta Grupo kolapsis pro simila kialo. Okazis misteraj kvereloj ĉe La Londona Esperanto-Klubo. Will Green ekŝiĝis kiel Honora Vizprezidanto, Peter Miles ĉesis veni post disputo kun John Wells. Mi mem petis ion diskuti kun John Wells fine de 2004 kaj mi ŝokiĝis pri la maniero en kiu li akre turnis sin al mi, daŭre ripetante, "Vi estas infaneca kaj kiel Lapenna". Ĉu vere mia peto "Ĉu nun estas bona

momento diskuti?” meritis tian traktadon?

En 2006 mi alprenis la redaktoradon de la kluba bulteno, kaj la reago de ordinaraĵaj membroj estis tre pozitiva. Mi ricevis ses spontanajn aplaŭdojn dum la jaro. Tamen ne ĉio estis kia ĝi ŝajnis.

Kiam mi ricevis la kontojn en la jarkunveno mi tuj rimarkis, ke la deklaro pri ĝusteco estis subskribita ne de kontkondrolisto, sed de la kasisto mem. Mi demandis pri tio, kaj la reagoj estis nehelpemaj. Se tio estis farita intence ĝi estas seriozo afero. La impreson donita estis, ke la kontoj estis kontrolitaj, kiam la subskribo estis tiu de la kasisto mem! La vortbatalo daŭris longe. Ili klarigis, ke unu kontkondrolisto malsanas, kaj ke la alia, Harry Barron, translokiĝis al Kimrio. Ili promesis ordigi la aferon por la posta jaro. Tamen en 2007 okazis ĝuste la sama afero denove. Neniu povas dubi, ke tiu falsado estis intenca. Iom poste mi demandis al la supozata kontkondrolisto, ĉu li ankoraŭ estas kontkondrolisto de La Londona Klubo. Li miris. Li neniam estis kontkondrolisto, li neniam estis petita, li scias nenion pri kontado kaj li ne estus akceptinta. La kombino de eventoj lasas nenian dubon pri manipulado de la kontoj kaj misgvidado de la membroj.

Membroj estus same ŝokitaj kiel mi se ili komprenus pri la gamo de manipuloj kiuj okazas en la klubo, inter homoj kiujn ili traktas kiel amikojn jam dum multaj jaroj. Sed por mi la reguloj estas samaj kiuj ajn okupas la postenojn, kaj kelkfoje oni devas insisti ilin sekvi.

Membroj estus ankaŭ ŝokitaj se ili komprenus la manipuladon en la ĉijaraj elsendaĵoj de la klubo. En la protokolo de la pasinta kunveno oni povus supozi, ke mia demando pri Harry Barron estas iel fripona. Ĝi ne estis. Kiam oni anoncis, ke Mikaelo Drogosz estas la nova kontkondrolisto, mi demandis, kio okazis al Harry Barron. La alineo registrita tute kontraŭas tion kion ili kredigis al la membroj en 2006 kaj 2007.

Estis ankaŭ aliaj manipuloj. Mi ne proponis Eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon; mi diris, ke tio necesas se la komitatoj volas reelektiĝi. Anstataŭe ili anoncis daŭrigon de la Jarkunveno, ne menciante, ke ties celo estas elekti la komitaton. La komitatoj ne

estis dece elektitaj.

Eĉ pri la kvorumo estas misrepzentado en la protokolo. Mi tutsimple demandis, kio estas la kvorumo, kaj sekvis longa parolado sen doni respondon. Mi devis insisti pri respondo, antaŭ ol ili anoncis, ke la komitato jam kalkulis, ke ĝi estas 7. Do kiam en la dua kunveno ili anoncis, ke ĝi estas 8, mi kompreneble demandis pri tio.

En tiu dua kunveno mi deziris scii kial John Wells prezidas anstataŭ la prezidanto, kiu sidis inter la ĉeestantaro. Ili voĉdonigis sen doni klarigon. Ili bone sciis ke estas serioza konflikto inter John Wells kaj mi, kaj do meti John Wells en tiun lokon bezonis klarigon.

En mia posta prelego pri la estonteco de la klubo, mi metis la ideon, ke la klubo ne akceptos ideojn pro tio ke ili estas bonaj ideoj, sed nur se la moŝtuloj de la klubo pensos, ke estas en la propra intereso akcepti ilin. Mi detaligis kiel funkcias la memcenzurado en la brita gazetaro, inkluzive de la Esperanto-gazetoj. Priskribo kiun provizis George Orwell validas ankaŭ por la Esperanto-gazetoj en Britio, kiuj estas forte cenzuritaj. Mi detaligis unu ekzemplon de la propagando kiu okazas en Esperanto-Asocio de Britio.

Temis pri deklaro de la Prezidanto, profesoro John Wells, en EAB Update 41, paĝo 3, en kiu li donis du supozatajn ekzemplojn pri miaj “friponaj kaj eble misfamigaj asertoj” en iu komunikaĵo. Tiuj du ekzemploj estis absurde falsitaj. Iama jura konsilisto de EAB skribis al John Wells, ke tio estas parto de “feroca kaj misfamiga kampanjo kontraŭ Ian Fantom”. La tekston de mia prelego mi poste rekonstruis sub titolo ‘Kial ni devas stagni?’, kaj tiun tekston mi provizos al vi laŭpete.

La misfamiga kampanjo ekis tuj post kiam mi liveris al John Wells, kiel prezidanto de EAB, financan ĉarton, kiun mi kompilis dum miaj esploroj pri la kolapso de la membraro de la asocio. Ĝi estis en malneta formo, sed mi tuj liveris ĝin al li, dirante, ke iu ajn kiu trovas tian informon havas devon raporti ĝin al la Prezidanto. Ĝi montris, ke dum la tuta tempo en kiu la kasisto diris al la membroj, ke la asocio formangas sian kapitalon, la kapitalo fakte spektakle kreskadis. Ĉu aŭ ne oni devis vendi la domon estas alia demando, kiel ankaŭ kiel oni uzu la kapitalon. Sed se tiu ĉarto estis proksimume ĝusta, la implico

estas, ke la Estraro diris malveron al la membroj dum tiu periodo.

Tuj sekvis plua publika kverelo, kun minacoj se mi estos denove kandidato por la Estraro, aŭ se mi ne pardonpetos pro tio ke la kasisto ne ŝatis la tonon de demando farita duonjaron pli frue. La afero estis absurda. Mi mem ŝokiĝis pri la maniero en kiu John Wells kreis pluan uraganon da malamo en la asocio, ĉifoje direktita al mi. Sed mia rolo estis esplorado, kaj ĉion mi dokumentis, ĉar tio kion mi trovis estis tre grava: la enplektiĝo de John Wells almenaŭ en la maskado de tiu skandalo.

Mi travivis la Aferon Lapenna en Londono en 1973 kaj 1974, kaj tion mi iom studis tiutempe. Se John Wells kapablis fari tion al mi, li kapablis fari ankaŭ al Lapenna. Mi bezonis tridek jarojn por kompreni pli-malpli kio okazas. Se John Wells ne estas ‘gatekeeper’ [pordogardisto], li certe kondutas tiel. Li laboris kun British Council kaj en siaj retpaĝo klarigas ke li ne laboras por MI6.

Tiun ĉarton mi montris al multaj membroj kaj nemembroj de EAB dum la pasintaj jaroj. Neesperantistoj komprenis facile, sed preskaŭ neniuj membro povis enkapigi ĝin, farante stultajn pretekstojn. La implicoj estas nepenseblaj. Tamen mi ĵus travivis kvin nekredeble malfacilajn jarojn en kiuj la vero estis daŭre subpremita per falsaj akuzoj, misfamigoj kaj mensogoj.

Fine mi sukcesis persvadi la redaktoron de EAB Update publikigi tiun finanĉarton. Ankoraŭ la membroj estos en stato de ‘cognitive dissonance’ [percepta malakordo] dum la faktoj ne kongruas kun iliaj multjaraj perceptoj. Tamen iuj komprenos. Jam unu membro demandis: “Do kial ni vendis la domon?”

En unu jarkunveno la kasisto de EAB rekte akuzis min pri kalumnio, sen diri specife kio estas tiu kalumnio, eĉ kiam mi sukcesis demandi al ĉiuj en la ĉambro. Ne estis kalumnio miaflanke, sed rilatis al incidento en kiu mi montris al membroj de La Londona Esperanto-Klubo tiun finanĉarton. La kasisto de EAB mem ĉeestis la kunvenon kaj tute silentis. Sed la vere ŝoka afero estis, ke la Prezidanto de EAB, John Wells, rifuzis al mi la rajton respondi al tiu akuzo, sed mem ripetis ĝin. Mi ne kredas, ke John Wells

laboras por lingvaj rajtoj aŭ ajnaj rajtoj, se li eĉ ne respektas la bazan homan rajton ke membro respondu al akuzo farita en la jarkunveno.

La Esperanto-movado en Britio estis transprenita de klico gvidata de 'public school snobs' [klasafektuloj el privataj loĝlernejoj], kiu gvidas la movadon en sakstraton. La membrara demandilo elsendita al membroj de la klubo ĉijare estis nur blufado por ŝajnigi, ke ili aŭskultas al membroj, kiam la malo estas la realo.

Dum 40 jaroj mi supozis John Wells pozitive motivigita amiko. Ankaŭ Ivo Lapenna supozis lin amiko kaj pozitiva subtenanto. En 1995 John Wells anoncis, en sia lasta alparolo kiel Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, ke jes estis mensogoj en la Afero Lapenna. Li anoncis, ke li parolas en la nomo de UEA. Dek du jarojn pli poste mi eltrovis, ke la Estraro de UEA nenion sciis pri tio ĝis mi kaj dumil aliaj aŭdis liajn vortojn en tiu salonego. Ŝajnas, ke en tiu deklaro kuŝis la kulmina mensogo en la Afero Lapenna.

Ni ne solvos tiun ĉi problemon per unu frapo. La manipulado en la komunikiloj de EAB kaj LEK kaj la manipulo de la demokratiaj procedoj estas troaj por ke ni povu fari per la normalaj manieroj. La unua paŝo estas certigi, ke homoj komprenas tiun eksterordinaran situacion, kaj ke ili estu en rekta kontaktado unu kun alia. Jam estis diskutoj en Britio pri 'io alia ol EAB', kaj internacie pri 'nova UEA'. Mi deziras diskuti private kun Esperantistoj en Britio pri ĉiuj eblecoj.

Estas tre verŝajne, ke la reago al tiu ĉi letero estos plua flustrokampanjo por sugestii al homoj 'O, li estas malfacila persono', aŭ 'Ne aŭskultu al li', aŭ eĉ pli malbone. Sed daŭre dum mia esplorado mi trovis ke kiam ili akuzas aliajn pri misfaroj, ili ĝenerale akzuas pri aferoj pri kiuj ili mem kulpas. Homoj pensu por si mem.

Se vi deziras priesplori eblecojn, aŭ eĉ ricevi pliajn informojn, bonvolu kontakti min rekte.

Jan Fantom

Europa subteno al la itala kongreso - Aligo al la seminario "kaj nun ni estu europanoj"

La Seminario Kaj nun ni estu Europeanoj, kiu estos la ĉefa programero de la venonta kongreso de Itala Esperanto-Federacio (Torino, de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 2011) estas agnoskita de Europa Unio kiel evento de programo Grundtvig por vivdaŭra lernado; por detalaj informoj aliru la kongresan retejon, (<http://italakongreso.esperantoitalia.it/>). 20 ne-italaj kongresanoj ricevos helpon de Europa Unio por partopreno; 8 italaj kongresanoj povos ankaŭ partopreni, kaj ricevos la koncernan dokumentaron. Tiucele aliru retpaĝon, indiku, ke vi intencas partopreni la seminarion, kaj sekve respondu la demandaron kiu aperas post tiu indiko. Bonvolu tion fari antaŭ la fino de marto; la kandidatigojn juĝos komisiono, gvidota de prof. Fabrizio Pennacchietti, kiu elektos 20 kongresanojn por la Europa subvencio; vi ricevos la respondon la 15-an de aprilo.

Renato Corsetti

Projekto 'esperanto125'

Aŭguste 2010, atingis la Komitaton de UEA ideo sendita de Stani Rynduch, polo vivanta en Germanio. ILEI tuj konstatis la utilon de tia projekto kaj la rolon, kiun ĝi ludu en ĝi. La estaro de ILEI en oktobro 2010 akceptis pluigi la projekton, serĉante por tio pliajn partnerojn. La celo de ĉi tiu mesaĝo estas fari duan alvokon trovi partnerojn kaj kunlaborantojn, ĉar ne nepre ILEI estu la ĉefa ludanto ĉi tie. Aperos en la aprila revuo *Esperanto* projekt-lanĉa artikolo, surbaze de kio necesos rapide fiksi la liston de partneroj kaj starigi la gvidorganon.

La projekto:

Lanĉi antaŭ la fino de 2010 projekton 'Esperanto125' kies celo estas organizi en 2012 en komunaj datoj tra multaj landoj serion da diversspecaj kursoj de Esperanto. La kursofino estos julio 26, 2012, la 125a datreveno de la lanĉo de la Unua Libro de Esperanto. La kurskomenco ĉiulande estu marto 23, 2012*, kiu estas la printempa/aŭtuna ekvinoksa tago, ĝuste 125 tagojn antaŭ la kursfino. La mezkursa tago estos majo 25, 2010, kiu konvene koincidas kun la feria semajnfino en multaj eŭropaj kaj aliaj landoj. Fleksebla temposkemo devas permesebli, ĉar laŭlandaj kondiĉoj kaj ferio-periodoj varias de lando al lando.

La kursoformo estos plejparte sed ne ekskluzive reta, laŭeble kun unu aŭ pliaj fizikaj renkontiĝebloj por kursanoj (ekzemple en tiu meza kursa longa semajnfino). Ekzamenoj estu proponataj kursofine (en la tiam okazanta UK, kaj aliloke). La projekto altiros atenton al Esperanto kaj ĝia jubileo, ĉefe pro unueciga siglo, la samtempa lanĉo multlande, kune kun la nepra eblo ke kursanoj tra la reto (skribe, parole, bilde) komuniku unu kun la alia dum la studado. La ĉefa celo de la kursoj estas la evoluigo de lingva kaj komunika kapablo, sed pro la omaĝata jubileo, iom da atento dediĉiĝu al la historio de la lingvo, specife al Zamenhof, la Unua Lingvo kaj la socia/komunika medio de tiu tempo el kiu naskiĝis la lingvo. Ĉu la oficiala kurso estu pagenda restas malferma demando; registriĝo estu deviga.

Kursospecoj:

Estu unu oficiala kurso, kiu estu ĉefe reta, kun renkontiĝebloj proponataj diverslande. Tiu kurso baziĝu sur ekzistantaj rimedoj – retkursoj aŭ eldonitaj lerniloj. Konvena gramatika bazo venos de *Detala Gramatiko de Esperanto* de Bertil Wennergren, aŭ aliaj kursoj ĉe *lernu_net*, sed la kurso ne nepre estu tro videble gramatike-bazita. La materialo estu aranĝita en 125 partoj, principe unu por ĉiu tago de la kurso – tamen homoj laboru propriritme. Sekve ĉiu parto enhavos modestan kvanton da nova materialo. La projekto tamen estu pli vasta. La organizantoj pretigu liston da kriterioj, normoj kaj rekomendoj, kontraŭ kiu oni povas kontroli pliajn kursojn aŭ skemojn. Kiu havas aŭ kreas propran kurson (retan, ĉeestan...) rajtas proponi ĝin al la organizantoj, por ke ĝi rajtu uzi la ŝildon “esperanto125”.

Organiza temposkemo (malneto)

Aprilo 2011: Decido ĉu pluri kun la projekto, sufiĉaj partneroj? Starigo de gvidgrupo.

Majo 2011: Decidoj pri simbolo, frapfrazoj, projekt-amplekso, starigo de buĝetoj (2011-2012)

Majo 2011: Starigo de la kurs-pretiga teamo, verko de kriterioj por allasi kursojn.

Majo 2011: Arigo de landaj projekt-kunordigantoj, starigo de projekta retgrupo.

Junio 2011: Prezento de la projekto dum la Nederland-Germana Kongreso en Munstero.

Junio 2011: Decidoj pri detalaj projekt-celoj kaj ŝlosilaj mesaĝoj por la varbado.

Julio 2011: Projektprezentado en UK, ILEI-konferenco kaj pliaj aranĝoj.

Sept 2011: Starigo de reta rimedbanko: Varbilaj tekstoj pretaj por tradukado, Projekt-konsilaroj.

Okt 2011: Testlanĉo de la kursejo ‘esperanto125’, kune kun kurso, babilejoj, forumoj ks.

Dec 2011: Decido pri la listo de kursoj kaj iniciatoj rajtigitaj uzi la siglon ‘esperanto125’.

Jan 2012: Arigo de informoj pri ĉeestaj kursoj kaj fizikaj suplementaj renkontiĝoj.

Feb 2012: Finpretigo de tradukitaj varbiloj, lanĉplanoj pretaj multlande.

Mar 23, 2012: Projektolanĉo multloke. Gazetaraj konferencoj, komunikoj, ekspozicioj...

Majo 25, 2012: Meza punkto; mem-testado, surlokaj paroligaj kunvenoj.

Julio 26, 2012: Kursofino, festado en UK kaj aliloke, ekzamenoj, ekspozicioj.

Retkursaj fakuloj

Reta livero de la kursoj ludos ŝlosilan rolon en la projekto, ĉar ĉeestaj kursoj ne estas ĉie organizeblaj. Esencas enplekti la fakajn sciojn de niaj programistoj kaj ret-prizorgantoj kaj frue decidi/starigi gastigan lokon por la oficiala retkurso. Necesas decidi ĉu la kursoj havos signifan aŭ limigitan prizorgadon flanke de mentoroj/gvidantoj. Ili ĉiuokaze enhavu interagajn memtestajn partojn, kun iuspeca monitorado, por ke ni mezuru la kvanton da interesiĝo. Necesas konvinki la retaktivulojn, ne vidi ĉi tiun tempe limigitan

projekton konkurenca al la ekzistantaj retofertoj. Ĉiu materialo en ‘esperanto125’ referencu la pliajn ekzistantajn rimedojn por retlerni, kaj plie por kontaktiĝi kun la parolkomunumo.

Ekzamenoj

La ekzamenoj de UEA/ITK estas oferteblaj al kursanoj. Averaĝa kursano kiu venis al la kursaro kiel plena komencanto devus povi per kontinua studado tra 125 tagoj atingi la KER-nivelon B1. Tiuj kun antaŭaj konoj aŭ elstara lingva talento povus celi B2. Tamen ni konsciu, ke tiuj kapabloj el retkursoj estos ĉefe latentaj. Je la duona punkto (majo) ni imagas nivelon de A2, kaj je tiu punkto eblas proponi retajn provekzamenojn A2.

La tradiciaj ekzamenoj de ILEI/UEA estas proponablaj, sed prefere ne samloke kaj samtempe kiel KER-ekzamenoj. Ekzemple, ili povos okazi en la ILEI-konferenco en 2012, supozeble en la semajno antaŭ la UK.

Laŭeble ekzamenoj estu ofertataj en almenaŭ du kontinentoj: prioritatas Eŭropo kaj Azio (pro la UK-loko), sed aliaj kontinentoj estas konsidereblaj.

La emocia mesaĝo de ‘125’

La ciferoj de ‘125’ prezentas fortan pozitivan signalon, kiu estas plene lingve sendependa. La ciferoj ascendas preskaŭ eksponente; ilia mesaĝo estas de ‘kreskanta kresko’. Tial aparte taŭgas projekta nomo ‘esperanto125’, kun ebloj por paralelaj projektoj, ekz. ‘lingvoj125’, ‘komunikado125’. Tiun 1-2-5 ŝtupon oni povas eĉ melodiigi al ascenda sonskalo, kiu uzeblas en la kursliverado kaj aliaj retaj informiloj.

Oni povas protesti, ke kurso kun 125 partoj prezentas la lingvon pli komplika ol ĝi fakte estas. Nia mesaĝado povas referenci naivajn sloganojn kiaj ‘Lernu la anglan en 30 tagoj’

kun ĝia korolario ‘Kaj forgesu ĝin en 20’. Nia mesaĝo devas esti, ke Esperanto ja estas serioza lingvo; decas lerni ĝin bone kaj profunde, ke ĝi ja havas nefacilajn partojn, eĉ kiam ĝi estas sendube relative facila. Ni emfazu, ke la nombro da ŝtupoj estas alta nur ĉar ili estas etaj.

Alispecaj jubileaj projektoj

Ĉi tio ŝajnas esti nia plej signifa jubileo de la sekvaj kelkaj jaroj, ni do bone eluzu ĝin. Malavantaĝo de ĉi tiu kursa programo kiel skizita estas ĝia limigita kapablo altiri eksterajn subvenciojn. Eblos redifini ĝin iom, aŭ almenau konsistigajn partojn, por fari ĝi pli subvenc-maturaj. Alie, eblas lanĉi paralelajn programojn kun tiaj celoj, kiuj konformos kun la postuloj de instancoj kun disponebla mono, ekzemple programoj pri translima lingvo-konsciigo en kiu Esperanto ludas helpan rolon aŭ figuras kiel nur unu lingvo inter pluraj.

Enplektiĝo de ILEI:

La prezidanto de ILEI prenas gvidan rolon por antauenpuŝi la ideon, sed kiu la espero, ke aliaj aliĝos kaj helpos motori ĝin. Tiu krome engaĝos sin en la pretigo de kursmaterialo. Tamen, ILEI havas tiom da aliaj devoj kaj planoj, ke li kaj ĝi ne havas rimedojn dediĉi tian tempon por motori la tuton. Se ILEI konstatas adekvatan reeĥon, ne nur de principa entuziasmo, sed pli signife liveron de konkretaj laborantoj, ĝi plue subtenos la projekton, tiom kiom ĝi kapablas.

Nia propagando

La granda eraro de Zamenhof!

Li devus devenigi la vortojn el la araba,
el la ĉina kaj el la zulua.

Tiel la tuta mondo vivus en paco,
ĉar neniuj komprenus unu la alian. ;

La eraro ne kuŝas tie.

La eraro kuŝas en la nuna provo angligi esperanton,
faritan de homoj, kiuj ne sufiĉe regas esperanton,
kaj kiuj ne estas filologoj, nek lingvistoj,
nek vortaristoj, nek esperantologoj,
sed nur scivolemuloj al kiuj ĉiuj
respektas kvazaŭ ili estus saĝuloj.

Ofte tiuj homoj nur scipovas sian denaskan lingvon
kaj esperanton.

PlejGRAVE, vi, Renato, baptopatras tiujn
homojn, kondiĉe ke ili ne uzu pli ol 500 vortojn.

En la portugala ni diras:

"Kiu ordonis al vi muziki, ŝuriparisto!?"

Kiel Landaj Sekcioj de ILEI kaj Landaj Asocioj de UEA kaj lokaj grupoj kunlaboru:

- Diskutigi la projekton en la propraj rondoj.
- Pripensi la eblojn okazigi kursojn aŭ renkontiĝojn enlande dum la projekta periodo.
- Anonci por la projekto kontakpersonon por ricevi projektajn informojn.
- Anonci vin formale kiel organiza partnero – kio povos havi ankaŭ financan flankon.
- Proponi kunlaboranton por la kerna projekta gvidoteamo (7-8 persona).

Antaŭdankon pro viaj reagoj!

SMG: 19 marto, 2011, Budapeŝto.

stefan.macgill@gmail.com

La kunveno Multlingveco: lingvo, povo kaj kono

organizata de la Universitato de Milano kunlabore kun Itala Esperanto-Federacio kaj aliaj instancoj, okazos en

Palazzo Feltrinelli en Gargnano del Garda (Brescia), la 24-an kaj 25-an de junio 2011.

Legu ĉion en la paĝoj

<http://www.filosofia.unimi.it/meeting/index.php/esperanto>

Renato Corsseti

Fondaĵo E-vid-E-nt-E jam 45 jarojn aktivadas

En la komenco de la jaro 1966 mi trovis informilon en mia poŝtkesto, kiu post legado kaj pripensado esence influis mian ceteran vivohistorion. Ĝin sendis organizaĵo, kies ĉefa celo estas batali kontraŭ la tiel nomata „nenecesa” vidhandikapeco. El ĝi mi ekkomprenis, ke en nia mondo vivas milionoj da blinduloj, kiuj povus ĉiumatene ĝui la miraklan sunleviĝon, se por ili prezentiĝus helpo oftalmologia. Sur mian koron marteladis la mantro, ke tri el kvar nevidantoj estas eviteble – ĉu preventive, ĉu kurace – vidhandikapitaj. Eblis per simbola modesta monsumo helpi al afrikaj okulpacientoj, ĉefe kataraktuloj, per operacio.

Agado E3

Mia edzino Vera kaj mi decidis „adopti” kelke da pacientoj en Kenjo kaj ankaŭ varbi pliajn adoptontojn inter parencoj, amikoj, najbaroj, kolegoj ktp. Kaj danke al la ĉielo ni havis sufiĉe da sukceso. Tio kondukis nin al la iniciato propagandi tiun valoran agadon ankaŭ inter „nia diligenta kolegaro”, kiu „en laboro paca ne laciĝas”. La bonan lingvon ja kreis okulisto, kiu krome ligis belan idealon, valoran ideon kun sia spirita infano. Tamen, laŭ ni la tiel nomata „interna ideo” ne restu tro interna kaj abstrakta, sed „eksteriĝu”, ekzemple per servado al blindaj kaj malforte vidantaj homoj. Malmultaj esperantistoj scias, ke unu tagon en la semajno Zamenhof, kiu tre forte nin inspiradis, kuracis siajn plej malriĉajn pacientojn plene senhonorarie. Tiel en novembro 1966 aŭdiĝis en la Esperanto-gazetaro la alvoko: „Esperantistoj, esperigu esperantojn”, per kio naskiĝis Agado E3. Kio ja estas pli bona kaj bela ol doni lumon al tiuj, kiuj ade, sed tute senbezone, vivas en eterna nokto? La iniciatinto spertis, ke estas treege malfacile malfermi okulojn de niaj samideanoj antaŭ tiu giganta mondproblemo. Propagandante en propra rondo li do perdis multe da tempo, energio kaj mono, kiujn li prefere utiligu favore al okulpacientoj en ekonomie malfortaj landoj. Post 25-jara agado li decidis limigi sin al sialandaj helpantoj kaj serĉi kolegon, kiu havas evidentan talenton sukcese heroldi inter alilandanoj kaj do „fiŝkapti” en verdstelaj akvoĵoj. Post dudeko da jaroj tiu persono bedaŭrinde ankoraŭ ne anoncis sin. En la periodo 1966-1991 la projektoj grandparte limiĝis al Afriko, nome al Kenjo kaj Malavio (veturantaj okulklinikoj), Kamerunio (40-lita okulhospitalo), Ganao (optikejo), Maroko, Sud-Afriko kaj Tanzanio (okulkuraca instrumentaro). Poste aldoniĝis Albanio, Bulgario, Kosovo, Moldavio, Rumanio, Rusio, Barato, Srilanko kaj Taĝikio.

Nova

nomo

En 1997 la nomo de la kampanjo alibaptiĝis en Nederlando kiel Stichting Zienderogen (kun e-e-e), kaj ekster la nederlandaj landlimoj ĝi konatiĝis kiel Fondaĵo Evidente (Eye-Care Foundation, ankaŭ kun e-e-e). Karakterizas nian fondaĵon, ke ĉiuj donacoj kaj subvencioj fluas rekte kaj integre al la projektoj kaj ke deĵoras ekskluzive volontuloj. Neniu ricevas pagon por sia laboro! Kromajn kostojn (varbado, papero, poŝtmarkoj, telefono, transporto ktp.) pagas, kiel lian kontribuon, la poŝo de la iniciatinto, kiu plenumis sian taskon en liberaj, eksterprofesiaj horoj. La plej gravaj laborterenoj jenas: misioj kun okulistoj kaj optikistoj, instruado al infanoj vidhandikapitaj, rekapabligo kaj loĝado. La helpo estas direktata al la plejmalriĉuloj; ni do laboras inter ciganoj, vivaĉantaj sur rubodeponejoj, inter prizonuloj en malliberejoj, en flegejoj por handikapitoj kaj pliaĝuloj, infanhejmoj kaj orfejoj, institucioj por infanoj malforte vidantaj kaj surdaj, hejmoj por eksaj infansoldatoj, socialaj entreprenoj, psikiatriaĵoj klinikoj ktp. Ĉiam oficiale invitas nin asocio por vidhandikapitoj, kiu faras por ni programon kaj sub kies respondeco ni praktikas por eviti panŝteladon al lokaj specialistoj. Dum la pasinta jaro libervoluloj de „Evidente” vizitis la jenajn landojn: Srilanko (februaro), Maŭritanio (marto), Ukrainio (aprilo), Maroko (julio), Kongo (septembro) kaj Rusio (novembro). Ne malofte invitoj atingas la kunordiganton pere de esperantistoj, kaj en tiuj landoj sekve okazas – kadre de nia ĉeesto – agrablaj kaj fruktodonaj renkontiĝoj kun Esperanto-kluboj (Kongo, Kaŭkazio, Kaliningrado, Krimeo ktp). Regule ili asistas dum nia laboro, akompanante kaj tradukante. En 2010 ni servis al ĉirkaŭ tri mil personoj per laŭreceptaj okulvitroj! Kiam ni deĵoris en Kaliningrado, la nederlanda okulisto, kiun mi en 1979 ekkonis en Kamerunio, tre miris, ke apenaŭ unu kolego komprenas la anglan lingvon. Tio grave malfaciligis lian taskon fake krominstrui studentojn kaj jamajn oftalmologojn ... La nunan jaron okulisto kaj kvar optikistoj vojaĝis al Maŭritanio por prepari gravan projekton (marto) kaj sep optikistoj vizitos okcidentan Ukrainion por starigi optikejon (aprilo). Dume ni ricevis inviton de esperantisto en Mwanza (Tanzanio), kiu zorgis pri oficiala invito de la asocio de vidhandikapitoj, kaj tio ebligis novan mision en la venonta junio. Sekvos en oktobro misio al Gambio. Plurajn invitojn ni estonte atendas el la vasta Rusio.

Stafeta transdono
En la pasinta januaro la iniciatinto de „Evidente” atingis la aĝon de 78 jaroj, kaj li ekopinias, ke venis la tempo por transdoni la daŭre kreskantan taskaron. Aliaj daŭrigu lian agadon, kaj tio signifas, ke tiam Esperanto ne plu ludos centran rolon, ĉar neniu nuna kaj morgaŭa estrarano scipovas ĝin. Ĉiam mi havis multe da kontaktoj kun blinduloj kaj surdoblinduloj pere de la brajloskribo. Mi esperas, ke almenaŭ unu estrarano ĝin lernos, sed la korespondo ĝenerale fariĝas en ... Esperanto. En la daŭro de la tempo ni finance adoptis blindajn infanojn en Kongo, Maroko, Maŭritanio kaj Rumanio. Tiu devigo daŭros ankaŭ dum la venontaj jaroj; por tio ni do aranĝis financan rezervon. Kore mi dankas al porblindulaj organizaĵoj, servokluboj, revendejoj, nia komunumo, ekleziaj komunumoj kaj monaĥejoj ktp pro la granda subteno, kiun ili dum dekoj da jaroj malavare donis al nia kampanjo. Kompreneble varman kaj sinceran dankon ankaŭ al ĉiuj fidelaj samideanoj. Ofte mi ricevis leterojn, en

kiuj oni nomis min „nobla homo”, kiu „faras laŭdindan laboron” ... Ĉu estas pliaj homoj noblaj kaj laŭdinde laborantaj?

Jacques TUINDER

(Jacques Tuinder estas prezidanto de Fondaĵo Evidente, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando. zienderogen@casema.nl, www.stichtingzienderogen.nl)

EDZIĜO NAJBARA GARANTIIAS DE ERARO

Kiam mi estis en Francujo, mia profesoro kun kredo liberalisma/avangarda, kiu ege simpatiis min, ofte invitadis min pasigi la semajnfinojn ĉe sia familio. Tiutempe, tre profunda amikeco ligis min al liaj gefiloj kaj neniam ni perdis okazon kunestadi.

Iun vesperon, post televida raportaĵo pri rasisma maltoleremo, la “prof”, surpodiiĝinta, deklaris:

- Mi ne sukcesas envere kompreni, kiel povas esti, ke homoj estu rasismaj. Vidu, ci estas inter ni kiel ci estus unu el niaj gefiloj. Ni traktas cin egalmaniere, ni alparolas cin ĉiam malhavante ian ajn superecan sintenon, ni manĝigas cin ĉetable kune kun ni...

En mia memo mi ekpensis: “multajn dankojn!”, dum li konkludis:

- Neniam ni prikonsideris cian haŭtkoloron. Do, vidu, ni ne estas rasistoj.

Mi prikomentis:

- Vidu, profesoro, foje la homoj estas rasistoj eĉ ne konsciigante pri tio, almenaŭ ĝis kiam ili mem ne estas implikitaj. Ni supozu, ekzemple, ke mi enamiĝis en vian filinon kaj, reciprokite, mi petus vian permeson ŝin edzinigi: kion vi dirus?

Li respondis:

- Be! ... tio estus tute alia afero!

Nia konversacio grundis tie.

Nura strangaĵo estis, ke ekde tiu vespero neniam plu li invitis min siahejme.

Kiu scias pro kio!

1) Charles Meray, fama matematikisto, aŭtoro de tute originala traktato pri infinitezimala analizo,

elpensinto de nova metodo por instruado de geometrio.
En 1900, post renkontiĝo kun Esperanto, li iĝis tuj ties fervora varbanto, propagandante la lingvon ĉefe en Universitata medio en Diĝono, sed ankaŭ en Parizo. Li altiris al Esperanto multajn gravulojn, kiel Bourlet, Appell, Sebert, Boirac mem kaj plurajn aliajn.

2) "Delegacio por alpreno de la lingvo internacia" - iniciatita dum tutmonda ekspozicio en Parizo (1900), de la francoj Louis Couturat kaj Leopold Leau, post konstato pri lingvaj malfacilaĵoj dum internaciaj kongresoj. En pli postaj jaroj, pri la Delegacio, Prof-ro Boirac tiel sin esprimis: La delegacio estas "tre lerte kombinita teatraĵo, kies scenojn 2-3 personoj direktis post la kulisoj".

Fontoj: Vikipedio kaj Enciklopedio de Esperanto (1934)

Feliĉo estas kiel papilio: se vi ĝin postkuras, neniam vi sukcesos ĝin kapti, sed, se vi sidas trankvile, eble ĝi haltos sur vi.

Nathaniel Hawthorne (Usona verkisto - 1804-1864)
(ĉerpita el TEA - bulteno)

Beletraĵoj

Vojaĝimpresoj

Alzaco-Loreno

Komence de aprilo 2011 mi estis invitita de Orientfranca Esperanto-Federacio. Mia malnova amiko Edmond Ludwig kaj ties kunlaborantoj aranĝis seminarion/staĝon tritagan en pitoreskejo inter montetoj en la franca departemento VOSGES, najbare de la regiono ALZACO, kie ariĝis pli ol 60 homoj alvenintaj ne nur el Francio, sed ankaŭ el Germanio, Nederlando, Rusio kaj Japanio. Estis eĉ du japaninoj el Sendai, kie okazis la tertremo kaj cunami!

Veturante de la aeroporto de Bazelo tra la valo de Munster, oni vidas ambaŭflanke belajn kampojn kaj montovicojn de la Vogezoj, pli fore la Nigran Arbaron kaj transe etendiĝas la majestaj Alpoj, kiujn mi scivoleme kaj gape rigardis el la aviadila fenestreto dum la

tuta vojaĝo de Vieno al Bazelo kaj de Bazelo al Munkeno, unue maldekstre kaj poste dekstre.

La valo de Munster

La domo kie mi instaligis troviĝas apud Muster, en vilaĝo loĝata de 1200 homoj. En Albanio tio povus estis urbeto. Ek de ĝi eblis atingi la tutan regionon kaj la montaron apudan. La duetaĝa domo de amiko Ludwig havis ĉambreton subtegmente plena de libroj, internan korton kaj kelkajn ejojn surtegmentitajn servintajn por la fojno kaj agrokultura kaj metiarta ilaro. Estis en ĝi ankaŭ du garaĝoj kaj granda betona subtera kelo, servinta kiel militrifugejo dum la unua mondmilito.

La ligno estis grava elemento en la konstruado kaj dekoracio de la domo. Ĉiuj ĉambroj kaj koridoroj estis tre puraj, ĉarme ornamitaj kaj ekipitaj. La dommastro uzis lerte kelkajn hejtigajn alternativojn kaj mem riparis ĉion.

Li kaj la edzino instruis la germanan, sed samtempe estis ankaŭ bonaj kuiristoj, ĝardenistoj kaj muzikistoj. Ili, la bopatro kaj la filino, estis tre gastamaj kaj ĝentilaj. Mi sentis min hejme la tutan tempon kaj ege dankas ilin pro ilia malavareco kaj nobleco.

Edmond promenigis min en multajn lokojn apudajn kaj forajn kaj klarigis ĉion, kion mi petis de li. Li konas la historion kaj geografion de la regiono, same estis bona akompananto kaj ĉiĉerono.

La vilaĝo estis ia miraklo, verdeca, kun arbaroj, paŝtejoj kaj kampetoj tre allogaj, kie vidiĝis bovoj, ŝafoj, ĉevaloj kaj kie oni produktis specialan fromaĝon, la faman fromaĝon de Munster. Min atentigis la vojetoj sur la montetoj kaj en la arbaroj, ĉe kies randoj estis ankaŭ benkoj kaj trafiktabuloj por la ekskursantoj. Tutan tempon aŭdiĝis la pepado de birdoj, kiu agrabligis la tagon. En Munster estas ankaŭ videblaj multaj cikonioj, birdoj kiuj simbolas Alzacon kaj laŭ la legendo alportas la bebojn !

La unua tipa alzaca vilaĝo, kiun mi vizitis estas EGUISSHEIM, unu el la plej belaj vilaĝoj en Francio, kiu estas premiita pro la perflora dekoraciado. En ĝi naskiĝis la papo LEO la IX-a (1002-1054)

Sekvis veturo al Mulhouse, kie mi partoprenis en la Esperanto-kurso de Edmond en la Fakultato pri beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj de Alta Alzaco. Ĉeestis la kurson iniciatitan de la dekano Yann KERRILES sep gestudentoj. Post la kurso mi prelegis pri Albanio, kaj multo ege impresis la junajn aŭskultantojn.

La venontan tagon ni vizitis du belajn lagojn en la montaro VOGÉZOJ sur du niveloj. La Nigra Lago estis kreita per digo. Ĝi uzas la akvon de la supra lago, la Blanka Lago, kiu enfalas tra tubo laŭ deklivo de la monto en turbinojn de hidrocentralo konstruita en 1928. Dumnokte parto de la akvo repumpiĝas al la supra lago. Ĉe ĉi lasta elstaras rokego, kie Edmond estis grimpinta junaĝa kaj malfacile estis desuprenirinta poste ! Malsaĝulo tiama!

La elektra energio estas uzata en tiu regiono ekde longe; ekzistis eĉ tramlinio konstruita en 1908 sur dentigitaj reloj, grimpinta ĝis la alteco de 1400 metroj al la monto Hohneck . Ĝi estis detruita dum la Unua Mondmilito. Tiam ĝi estis la plej alta dentrada fervojo de la Dua Germana Imperio.

La ĉefurbo de la departemento Haut-Rhin (Alta Rejno) nomiĝas COLMAR. Ĝin trafluas kanaletoj nun navigeblaj fare de barkoj por turistoj, per kiuj eblas viziti la tipan kvartalon

Malgranda Venecio. Iam ĉe ties bordoj stariĝis la tanejoj, pro tio ĝi tiam certe stinkis, sed nun ne plu. Ĉio estis agrabla, eĉ se ankoraŭ mankis la amaso da floroj (ĉefe geranioj), kiuj dumsomere dekoracias la domojn.

Colmar ĉefe konatas pro la fama altara pentraĵo de Matthias GRÜNEWALD en la muzeo Unterlinden, unu el la plej vizitataj muzeoj en Francio.

KAYSERSBERG : naskiĝurbo de Albert SCHWEITZER

En KAYSERSBERG, alia vizitinda vilaĝo en la alzaca vitejaro, naskiĝis Albert Schweitzer, Nobelpremiito pri Paco en 1952. Li unue estis pastoro/teologo, fama muzikisto, kiu amegis la muzikon de Johano Sebastiano BACH kaj verkis faman libron pri la interpretado de ties muziko. Kiam li iĝis 30-jara li ekstudis medicinon, migris al Afriko, kaj kreis tie hospitalon en la ĝangalo de Gabuno por flegi la leprulojn. En la vilaĝo GUNSBACH, apud Munster, viziteblas lia loĝdomo, ankaŭ kun muzeo, kiel en Kaysersberg.

HUNAWIHR kaj BERGHEIM

Sekvante la tiel nomatan "vinstraton" laŭlonge de la alzaca vitejaro ni alveturis etan fortikaĵan preĝejon antikvan, kie ni trovis la tombon de loka alzacilingva poeto mortinta antaŭ kelkaj jaroj, Gaston PETER. Ĉu gejunuloj kapablos ankoraŭ legi ties poemoj, se ili forgesas sian lian lingvon ?

Ni vizitis ĝis BERGHEIM, vizitinda nur pro sia tipeco, same kiel la fama vilaĝo RIQUEWIHR, kiun ni ne plu havis la tempon viziti.

Historio de Alzaco : bataloj por dominanteco

La regiono Alzaco-Loreno ampleksas malpli ol 10 000 kvadratajn kilometrojn kaj loĝantaron de 2 milionoj. La provinco estis dum jarcentoj ia "kverel-pomo" unue inter la Sankta Imperio Romia Germana kaj la franca reĝlando, poste inter la Franca Respubliko kaj la Dua Germana Imperio, fine inter Francio kaj la hitlera Germanio. Laŭ la politika situacio la landlimo inter la du landoj estis la riverego REJNO (kiel nuntempe) aŭ la supro de la montaro VOGEZOJ.

Kiam ĝi aneksiĝis al Francio ekde 1648 (?) (post la 30-jara milito) ties loĝantoj, etne ĝermanoj, devis submetiĝi al la francaj leĝoj, kio ne okazis senglumbe, ĉar deko da tiel nomataj liberaj urboj dependintaj rekte de la imperiestro tiam perdis sian sendependecon.

La lastan fojon tio okazis post la Dua Mondmilito. Sed eĉ ĝis hodiaŭ pluvalidas kelkaj leĝoj devenantaj de la Dua Germana Imperio, kio estas escepto en la ege centraligita Francio.

Interalie pro fakto ke la franca registaro ankoraŭ (samkiel tiu greka) ne subskribis la Eŭropan Konventon pri Lingvoj, la loka alzaca dialekto apenaŭ aŭdiĝas kaj instruitas en la lernejoj. Ĝin parolas ankoraŭ duonmiliono da loĝantoj. Nur de kelkaj jaroj ekfunkcias dulingvaj klasoj, en kiuj oni instruas alterne en la franca kaj la germana lingvoj.

Sendube la XX-a jarcento notis la plej grandajn malfeliĉaĵojn kaj suferadojn de la popolo de tiu regiono. Tion eble antaŭdiris la fulmofajro bruliginta la belan hotelon sur la monto Hohhneck, kie troviĝas ege frekventata skiejo, ĝuste la lastan nokton de la jaro 1899 !

Ambaŭ mondmilitoj kaŭzis sennombrajn viktimojn en civiluloj, armeanoj, brutaro,

samkiel dezertigitajn arbarojn kaj vitejojn, ruinigitajn domojn kaj pontojn.

Mi vizitis du grandajn tombejojn de francaj kaj germanaj soldatoj troviĝantaj ene de arbaroj sur la alteco de pli ol 1000 metroj. Sur monto inter la du tombejoj estis ankaŭ interesa subtera muzeo kaj eltrigitaj tranĉeoj el la unua mondmilito. Mi vidis aliloke ankaŭ tombejojn de usonanoj sur montopinto dominanta tutan areon ĉirkaŭe en la vilaĝo SIGOLSHEIM. Tie estis ankaŭ mortigitaj tunizianoj dum severa franca vintro.

Memorigejo-obelisko troviĝas en ĉiu urbo kaj vilaĝo, sed sen virkoko-simbolo franca, ĉar sur ili ankaŭ legeblas la nomoj de la falintaj lokaj soldatoj batalintaj ĉe la germana flanko dum la Unua Mondmilito kaj devige envicigitaj en la nazian armeon dum la Dua Mondmilito.

Nun kompreneble ne plu ekzistas fizika landlimo. Oni povas tutfacile transveturi la ponton sur la riverego Rejno kaj alveni Germanion kaj reen. Tial multaj lokanoj veturas ofte tien eĉ por frandi kafon kaj kukojn, aĉeti hordean panon aŭ profesie labori, ĉar tiuj, kiuj sufiĉe bone regas la germanan lingvon, povas tiel eskapi la senlaborecon per enposteniĝo en Germanio aŭ Svisio.

Pri la milito en la regiono oni povas eklerni ankaŭ en la muzeo de Sant-Dié, trans la montaro Vogezoj, kiun mi vizitis kun la staĝanoj ĉe la fino de la kunveno. La urbocentro estis tute ruinigita dum la lasta milito. Pro tio, oni vidas tie nun modernstilajn domojn.

En la muzeo oni ekscias pri eminentuloj devenintaj el la regiono, verkistojn kaj poetojn. Tie vivis ankaŭ la mondfama geografo unuafoje aperiginta sur la mondmapo Amerikon, Martin Waldseemuller, kaj la franca ministro Jules Ferry, kiu kreis la francan nacian kaj laikan eduksistemon.

Mia partopreno en la esperanto-semajnfino

La renkonto komenciĝis per turismado. Edmondo veturigis min al la staĝejo trans la montaro Vogezoj kaj unue vizitigis al mi du lagojn je tektonika deveno, kiujn mi povis admiri el la alteco de Vogezoj : Longemer kaj Gérardmer. Ili kuŝis en belega valo plena de florkampoj je jonkviloj, fama endemia floro tre ŝatata de lokanoj kiuj eĉ aranĝas specialan festivalon tiutempe. Ĉiuj kutimas pluki jonkvilojn kaj pretigi bukedojn, kiujn oni donacas al edzinoj kaj amikoj. Tiel faris ankaŭ mia amiko.

Sabate matene samideano Roberto veturigis min al simpatia fabriko de bonbonoj en Plainfaing, ene de la montaro Vogezoj, plena de verdeco, je alteco de 500-1300 m. Tie laboris 25 homoj, kies duono estis samfamilianoj. Post 30 jaroj la fabriko estis famiĝinta en la tuta Francio kaj ekster ĝi pro la alta kvalito kaj aromo de la tieaj bonbonoj kaj danke al la efika promociado far la tieaj laboristoj. Mi volonte aĉetis kelkajn pakaĵojn da tiaj.

Mi prelegis kelkhore pri Albanio plenigante la vakuon en la konoj de la ĉeestantoj, pro nia memizoliĝo longjara kaj pro indiferenteco de la lokaj amaskomunikiloj pri eventoj en nia lando.

La esperantistoj estis interesataj eklerni pri la hodiaŭa Albanio, sed ankaŭ pri ties pasinto historia, pri la periodo de la totalisma komunisma reĝimo, pri la turismaj aspektoj kaj eblecoj de vizitado tie. Komprenble mi estis pretiginta delonge ĉion tion. Mi kunportis ankaŭ multajn revuetojn, faldfoliojn, mapojn kaj KD-ojn ricevitaĵn en la ministerio pri turismo.

Ĉiuj estis surprizitaj, kiam mi rakontis pri la praeco de la albana lingvo, prezentante argumentojn de la franca lingvisto Robert d'Angely, kiu deĉifris la pratempajn epitafojn de la eŭska, etruska, mikena, hitita, frigia kaj aliaj popoloj de Mediteraneo, nur per la albana; la rezultatojn de 40-jara esplorado de la itala lingvisto Giuseppe Catapano, kiuj konfirmis, ke la egiptaj hieroglifoj baziĝis sur alfabeto simple eksplicita per la albana lingvo; mi rakontis pri la fleksebleco kaj eksterordinara esprimkapableco de la albana, ks. Mi konatigis ilin per multaj albanaj vortoj laŭ alfabeto, pri la maniero de formado de la ĝenro, pluralo, deklinacio, konjugacio ktp.

Apartan prelegon mi dediĉis al la amuza matematiko, prezentante mian 40-jaran sperton sur tiu kampo. Krome mi pritraktis ankaŭ kelkajn filozofiajn aspektojn dum la instruado de matematiko. Surprizinde tiu prelego ege altiris multajn partoprenantojn kaj ne nur la junulojn. Ili eĉ petis min sendi aldonajn materialojn tiuteme per la reto.

Ankaŭ mi mem multon ellernis dum la konversacioj kun esperantistoj el diversaj landoj. La senperaj kontaktoj de homoj envere povas kontribui pli notinde al la reciproka interkonatiĝo de la diversaj nacioj. Tion favorigas plejmulte Esperanto kiel relative facila neutrala lingvokomunikilo. Pri mia prelego atentigis la taggazeto Vosges-matin.

Multaj partoprenintoj deziresprimis viziti Albanion en plej oportuna tempo.

Vespera koncerto de FAMO

Bela surprizo estis la koncerto aranĝita por la ĉeestantoj de la staĝo la lastan vesperon. Oni estis invitinta la blindan kantiston kaj muzikiston je kromnomo FAMO, el Parizo, akompanata de sia marokena amiko Tarek. Famo estis sufiĉe freŝbakita esperantisto, kiu komunikis tre facile kaj lerte kun ni. La kanzonoj, kiuj daŭris pli ol 90 minutojn havis varian temaron aktualan kaj la voĉo estis tre dolĉa kaj potenca. Kiu ajn asocio alia estus honorata kaj feliĉa inviti tiun tre apartan kapablan artiston, kiel Famo.

Vizito de Strasburgo, ĉefurbo de Eŭropa Unio, la prelego en esperanto pri Albanio okaze de la tiea Semajno de Esperanto.

Post la jaro 1949, kiam fondiĝis la Konsilio de Eŭropo ariganta nun 47 landojn, Strasburgo fariĝis pli fama, pligrandiĝis, pliornamiĝis kaj vizitatis de sennombra amaso da turistoj (inkluzive de gelernantoj kaj gestudentoj) dum la tuta jaro. Nuntempe ankaŭ la nova tutvitra sidejo de la Eŭropa Parlamento allogas amasojn da vizitantoj. Samloke troviĝas la sidejo de la Eŭropa Korto pri Homaj Rajtoj. Apudas la belega Parko de l'Orangerie.

Tiun kvartalon mi revizitis posttagmeze per turisma ŝipo navigantaj sur la ĉirkaŭantaj kanaloj. Tiuj ŝipoj startas ĉe la kajo antaŭ la Palaco ROHAN, en la urbo, ili vizitigas ankaŭ la tipan kvartalon Petite France ("La malgranda Francio" tiel nomata pro la seksmalsanoj, kiujn eblis tiam kapti tie !) kun siaj trabfakaj domoj. **Niaj samideanoj sciuj, ke dank'al la klopodoj de la strasburgaj esperantistoj la komentario estas aŭdebla en Esperanto.**

La katedralo

Kompreneble neniu vizito de Strasburgo fariĝas sen admirado de la gotika katedralo, kies unika turego elstaras. En ĝi allogas amason da turistoj la grandega astronomia horloĝo.

Fine de la vizito ni trovis restoracion, kiu proponis lokajn specialaĵojn, sed la surprizo estis, ke la estroj estis hindoj ! Sed la menuoj estis tipe alzacaj !!!

Vespere, la esperantista societo de Strasburgo estrata de Bruno Flochon, aranĝis renkontiĝon kun mi, por ke mi prelegu pri Albanio okaze de la Semajno de Esperanto. Interpretis al la franca lingvo mia amiko Edmond.

Mi rakontis pri la tradiciaj interrilatoj de Albanio kaj Francio, pri la sinteno de ĉi-lastaj al Kosovo kaj al la albana afero ĝenerale, pri la eblecoj de pli fortaj ekonomiaj kunlaboroj, k.t.p.

Inter la ĉeestantoj estis ankaŭ pluraj gejunuloj. Kelkaj el ili petis min pri la albana lingvo, pri la periodo de komunismo kaj de ŝanĝiĝo postkomunista, pri la moviĝeblecoj de albanoj post decembro 2010, pri la rolo de la fremdaj investaĵoj ĉe ni, pri la nivelo de pagoj kaj salajroj ktp.

Viro ĉeestinta diris al mi, ke li jam vizitis Albanion en la jaro 2005 per sia veturilo kun ruldometo je la direkto de Grekio kaj estis tre kontenta pro la gastamo ĉe albanaj familioj. Iu sinjorino demandis min pri la ebleco de traveturado de la lando per bicikloj. Mi respondis ke jes, kaj aldonis ke en la lasta jaro nin vizitis geedza paro de francaj biciklistoj, entreprenintaj rondvojaĝon tra la mondo...

La atomcentralo

La lastaj eventoj en Sendai de Japanio kaj en ties atomcentralo en Fukushima, ege maltrankiligis la loĝantojn de Alzaco-Loreno. Kial do? Ĉar en ilia regiono, tuj ĉe la limo kun Germanio estis konstruite la unua atomcentralo de Francio. Plie, 6 jarcentoj antaŭ ankaŭ en ties apudeco okazis tertremo! Tial leviĝis protestoj kaj petegoj por fermi ĉi centralon.

Cetere, sur Rejno estis almenaŭ sep kaskadoj kiuj delonge estis eksplutataj por produkti la elektran energion. La entuta ties kapacito estis ĉirkaŭ 1400 MW! Mi havis la okazon vidi unu el ili propraokule.

Mi forlasis Francion, ĉi tiun eŭropan evoluintan landon, kiu kune kun Germanio transpasis jam la lastan mondan ekonomian krizon kaj al kiu albanoj ĉiam rigardis dum jarcentoj, inspiriĝis de ĝi kaj eĉ kontribuis iel (ni rememorigu nur ke Napoleono la Unua estis albandevena laŭ multaj faktoj trovitaj lastatempe..).

Bardhyl Selimi

"La nokto de Ustika "

Petro Marko

(Fragmento el la romano albana)

Okazas dum la vivo ke renkontante kelkiun, ŝajnicas al vi ke vi jam konis lin delonge kaj tuj ekvolas malfermi al li vian koron.

Kaj ĉiu havis pensojn por si mem. La momentoj de meditado pri si estas la plej melankoliaj. Plej pezaj, ĉar ju pli vi volus nombri de unu ĝis mil aŭ dekmil, ĵus ekdormante, estas maleble. La tagaj scenoj forpelas la ceterajn.

La enprizonigoj ne estas kiel la homoj kiuj vidas la sunon kaj la stelojn. Ili havas propran lingvaĵon. Proprajn kapriciojn. Eĉ estante en via hejmo, enfermite de ekstere, ŝajnas ke vi apenaŭ povas satiĝi per enspirumo.. Des pli en la prizono, en la kelo! Kaj, pro fakto ke la cerbo stagnas ene de ĉiuj kvar muroj kaj la animo fuĝas serĉante la hieraŭajn piedspurojn, en la cerbo formiĝas densa nebulo, densa kiel la aromo de la kelo, kiel malbonodoro de la prizonaj koridoroj...

Mi ne scias de kie venas ĉi tiu peza vorto seplitera: Prizono... des pli mi ne scias kiam la homo elpensis ĉi tiun kondamnon por si mem.

Ne ekzistas ja limoj de malespero, kiam vi foriras disde via propra lando, enkatenuite per manoj kaj per piedoj, por ke mortu ien ajn, for de viaj

kunhomoj, for de via hejmo..

Kaj, se mi anstataŭis lin, kiel mi kondukus? Kion mi farus? Du tagnoktojn stare atendante la pendiĝon per la ŝnuro. Kion do ekpensus mi? Ĉu mia cerbo

funkcius? Aŭ ĉio limiĝus imagante la pendigilon? La homo sin pretigas eĉ provante prezentante sin antaŭ la amantino kaj tuj proksimiĝante al ŝi li perdas la orientiĝon.

Kun krucigitaj brakoj surbruste, mi atendis kiel atendis ĉiuj aliaj. La gorĝo blovis kiel en la forĝejo. Kaj ĉiuj ĉi maljunuloj starantaj kun kapon malsupren, kion pensas? Ĉi tiuj maljunuloj kun maldelikategaj kaj silentaj vizaĝoj, pri kio pensas? Peza estas por maljunulo ekpensi ke li mortos for de lia vilaĝo kie li elkreskis kaj fariĝis nedisigebla parto de ties tero kaj kameno. Ili ne plu havas cigaredojn por malpezigi la grandan doloron... Jen kiel ili pliseverigas la vizaĝon, kvazaŭ diras al la morto: " Ne! Ĉi tie ne! Tie, tie, kie blovas la vento de niaj montoj! Tie ĉe la fluado de la riveroj malsuprenirantaj de la neĝaj montoj. La maljunuloj ekgestis la krucon kun mallevita kapo...

Sed la la enprizonigito, sen libero, sen flugiloj, eĉ kiam li manĝas, ŝajnas ke li ne manĝis. Ĉar lian korpon elkorodas la katenoj, la malĝojego, la sonĝoj, la nervoj.. Miaj pensoj estis karbigitaj, kiel la herbaĵoj bruligitaj pro la sunradioj. Tiumomente mi ne sciis kio okazus. Sed , ĵus alproksimiĝinte al la granda pordo de la kastelo, oni haltigis nin.

-Ĉi tio estas ja la enirejo de la kalvaro. Kalvaron nomiĝas ĉi tiu kastelo. Tie supre, sur ruinigita loko, estis skribite la versoj de Dante:

"Lasciate ogni speranza voi ch entrate!"

(lasu ĉiun vian esperon ekstere)

La pensoj postsekvis unu la alian, kelkfoje transpasante eĉ la prizonajn katenojn..Ĉi tio estis plej granda peno: la korpo plurestis ĉiam en la kelo kaj la penso forflugis kien ajn.

Al ĉiuj bedaŭris ke ili malpliiĝis. Plaĉis al ni esti kvazaŭfratoj.. Enkatenigite ni estis unuiĝintaj ekde en la prizono de Tirana...

Eliru, miaj memoroj,
Tien kien vi estis ĵetitaj
Tiom amece kaj triste.
Eliru! Nun mi volas!
Ludi kun vi!,
Plori kun vi,
Vivi kun vi!

O miaj memoroj,
Nun mi amas vin!

Anekdotoj

Dialogo kun maljunulo

Maljunulo staradas en la pluvo antaŭ la drinkejo. En la mano estas bastono, sur ghi ŝnureto, ghi pendas en flakon. Preteriras lin viro, li nekredeme rigardas kaj alparolas la maljunulon:

-- Diru, kion vi faras ĉi tie?

-. Mi fiŝhokas -- respondas la maljunulo.

La junulo eksentas kompaton, li invitas lin al biereto. Ili sidadas apud po unu kruĉo da biero, la junulo demandas la maljunulon:

-- Kaj diru, kiom da fiŝoj vi jam kaptis?

-- Ĝhis nun sep, vi estas jam la oka.

Pomo

-- Mi petas unu pomon!

-- Iĝhis du, ĉu povas resti?

Ebriulo

Ebriulo ambulas survoje hejmen el la drinkejo. En la malluma strato li kolizias kontraŭ sinjorino, kiu konsternite vangofrapas lin. La ebriulo ekpensas:

-- Mi eĉ ne supozis tiel rapide alveni hejme.

Almozulo

Ĉifonulo almozas de la preterirantoj.

-- Ĉu vi volas aĉeti alkoholajhon per tiu mono? -- demandas lin iu piediranto.

-- Tute ne, kion vi pensas? -- senkulpigas sin la almozulo.

-- Eble cigaredojn, ĉu? -- li demandadas plu. .

-- Mi ne fumas, sinjoro!

-- Tiam tute certe vi volas ludi en ĉevalkonkurso!

-- Sinjoro! Mi estis en ĉevalkonkurso neniam en la vivo!

-- Ĉu vi bonvolus veni kun mi en mian hejmon? -- petas la viro.

-- Kiuĉele?

-- Mi deziras montri al mia edzino, kio estas la sorto de tiu, kiu nek drinkas, nek fumas, eĉ nek vizitas la ĉevalkurejon.

KUZO

-- Imagu, ĉi tie mi renkontis mian kuzon.

-- Ĉu vere? Ĉu vi estas kontenta. Ĉu li estas bonaspekta, simpatia?

-- Ne tre. Sufiĉe malgranda, sulkighinta, kalva. Li havas grandan stomakon, kaj li ege grumblis, se la botelo malplenighis.

-- Terure! Tiel drinkema! Kiom aĝa li estas?

-- Tri monata.

KIEL VEKI AMON EN VIRINO?

Onidire sur la plej alta montopinto de Tibeto vivas la plej sagha homo de la mondo. Foje venis al li junulo por ekscii, kiu vojo kondukas al la koro de virino ekamita.

-- Diru al mi, majstro de majstroj, kiu estas la plej mallonga kaj plej certa vojo al la koro de virino?

La majstro respondis:

-- Ne ekzistas certa kaj rekta vojo al la virina koro, fileto; nur apudravinaj padoj -- sen mapo kaj kompas vi devas marshi sur vojoj plenaj de rokoj, dornozaj arbustoj kaj krotaloj.

-- Sed majstro, kion fari por konkeri la koron de la amatino?

-- Kara mia dischiplo! Notu bone, chizu en la cerbon kaj koron miajn instruojn kaj admonojn!

1. Purigu la dentojn!
2. Ne skrapu la skroton antaŭ shi!
3. Portu al shi florojn kaj multe-multe da donacoj!
4. Antaŭ ol urini levu la sidplaton de la necesujo, kaj poste ne forgesu ghin refaldi.
5. Lavu al vi la manojn antaŭ ol elveni el la necesejo!
6. Ne manghu shmacante!
7. Ne ruktu laute, prefere neniam ruktu!
8. Ne furzu!
9. Ne parolu malbele pri shia patrino, amu shin same, kiel la propran patrinon!
10. Ne blasfemu!
11. Chiam ridu pri shiaj malbonaj ŝercoj!
12. Ne jhaluzu pri shi, se tamen jes, nur iomete!
13. Lasu, ke shi jhaluzu pri vi! Shi rajtas.
14. Ne kreskigu barelventron! Ech, neniam dikighu! Sed shi rajtas! (Tamen neniam diru al shi!)
15. Ne restadu longe en la banchambro!
16. Ne lasu la vishtukon falinte sur la planko!
17. Neniam diru al shi, ke shi ne povas stiri!
18. Ne malfrue venu hejmen! Ekirinte el la laborejo tuj iru hejmen!
19. Ne amuzighu kun la amikoj! Prefere ne havu amikojn!
20. Ne revu pri amikinoj!
21. Ne algapu, ech ne menciu la mamojn kaj pugon de shiaj amikinoj!
22. Ne estu avara! Uzu po du banko- kaj kreditkartojn!
23. Ne alrigardu aliajn virinojn! Ech komprenu nun por chiam, ke aliaj virinoj -- ech ne ekzistas!
24. Ne parolu pri via eksamikino! Vi neniam havis iun antaŭ shi!
25. Minimume po 24 fojojn tage diru al shi: "Mi amas vin!"
26. Spertighu kiel kuiristo!
27. Lavu la vazojn, kaj la kuirejon tenu pura!
28. Rearanĝu la liton (chiam)!
29. Alvoku shin telefone, kie ajn vi estas, kaj kiel ajn vi estas okupata!
30. Lasu shin aĉeti vestojn kaj ŝuojn lauvole, chiam! Ech, helpu al shi en la aĉetado kaj selektado daŭranta plurajn horojn! (Kaj bonvolu rideti dume!)
31. Lasu shin telefoni dum horoj, kaj pagu shiajn fakturojn!

32. Ne ronku!
33. Venu al vi en la kapon, ke vi ne malshatas futbalmatchojn kaj autokonkurojn
Formulo--1!
34. Razu vin chiutage por ne gheni shian hauton!
35. Ne pensu nur pri la seksumado, sed ne troigu la malon, proponu ghin al shi, ech se vi estas laca!
36. Obeu shin, se shin doloras la kapo, sed se shi petas ion de vi, tuj plenumu shian deziron! Ho! Kaj ne ekdormu tuj post la fino, rigardu al shiaj okuloj kaj karesu shin ghis shi silente endormighos!
37. Diru al shi chiumomente, ke shi estas la plej bela virino, kiun vi iam ajn vidis...

Disĉiplo

La elcherpita disĉiplo turnis sin por iri malsupren de sur la montosupro. La majstro postkriis lin:

-- Atendu filo, revenu!

Sed li respondis:

-- Nee, majstro... Sufichas!

ASPEKTO

La edzino reveninte de la frizisto demandas la edzon:

-- Chu vi rimarkas iun shanghon?

-- Nenion. Kial?

-- Mi estis che frizisto.

-- Kaj?

-- Mi atentigas vin, ke vi diris hierau, ke mi kun tiu longa hararo similas al maljunulino.

-- Jes. Kaj?

-- Chi tiel, kun mallonga frizajho mi jam alimaniere aspektas. Vidu!

-- Jes, vere kara. Vi pravas. Nun jam vi aspektas ghuste kiel maljunulo

Sekreto de la sukceso geedza

En intervjuo estas demandata la sekreto de la sukcesa geedzeco:

-- Ni regule frekventas restoracion, chiu semajne du fojojn. Iom da kandelbrilo, vespermangho, milda muziko, danco. Shi iras marde, mi vendrede.

Okulisto

-- Sinjoro doktoro, supozeble mi bezonas novajn okulvitrojn!

-- Tutcerte, ĉar vi diras tion en viandovendejo al la viandisto.

Chu gravas havi altan protektanton?

Tri kandidatoj volas trapasi la priakceptan ekzamenon.

Eniras la unua kun alta protektanto. Demandas la priakcepta ekzamenkomisiono:

- Kiam finighis la dua mondmilito?
- Eble chirkau la mezo de la pasinta jarcento – diras la kandidato.
- Genie! Vi estas akceptita!

Eniras la dua kun iom grava protektanto.

La demando estas la sama:

DENTOTROMULTIGHO

- Etulino la unuan fojon en sia vivo devas iri al dentokuracisto. Shi tre timas kaj estas eks-citita. Dum vestado shi demandas la patron:
- Pachjo, chu vi estis jam che dentisto?
- Jes, mi estis jam multfoje.
- Chu vi neniam timis?
- Kial mi devus timi? La doktoroj estas tre agrablaj homoj.
- Chu oni forigis jam denton el via busho?
- Jes, memkompreneble, plurajn.
- Kiom?
- Cent, kara mia, cent!

■ **REKLAMACIO**

- Sinjoro doktoro, mian deshiritan oreilon mi perdis dum la akcidento.
- Ghi ne estas perdita. Mi sukcese alkudris ghin. Vi dormis dum la operacio.
- Jes, sed tiu orelo ne estas la mia.
- Kial vi opinias tion?
- Apud mia orelo estis shovita krajono, per kiu mi ofte skribis.

Vespera lernejo

En vespera lernejo de laborantoj:

- Chu vi havas hejman?
- Jes, chu mi vershu iom?

Translokiĝo

Viro trasloghighas, sed la kanapon li povas neniel transigi trans la pordon.

Li kolektas kaj strechas la fortojn, li kolektas kaj strechas la fortoj kaj denove kaj denove, fine ghi tiel firme fiksighis en la pordo, ke ghi ne plu moveblas. Tiam li telefonas al la najbaro, kiu transaflanke de la pordo kolektas kaj strechas siajn fortojn, kolektas kaj strechas siajn fortojn kaj denove kaj denove. Pasas tiel chirkau dek minutoj, kiam fine la posedanto anhelante ekparolas:

- Ej, najbaro, mi pensas, ke ni sukcesos ghin elporti neniam!

La najbaro surprizite:

- Chu nun ni volas ghin porti elen?

FIANCHO

- Novajho! Baldau mi edzighos.
-- Chu vi tiel rapide trovis vian idealon?
-- Mia estonta edzino ne estos tro admirinda.
Shi estos 155 centimetrojn alta ,dika
blondulino kun verdaj okuloj.
-- Vi ja chiam, ech antauhierau revadis pri
nigra, alta svelta diablino. Chu vi elrevighis?
-- Shia patro hierau vizitis min. Li kondukis
severe. Li diris, ke post la lastaj okazintajhoj,
se mi ne edzinigos lian filinon, li mortpafos
min. Kion fari? Li bondeziris adiauante.

Arestitoj post liberiĝo

- Arestitoj post liberigho babiladas pri la
vivo en la malliberejo.
-- Chu ankau che vi chiu portis sur la vesto
numeron anstataŭ nomo?
-- Jes. Mi portis sur la brusto numeron 4777.
-- Chu bruste? Kion vi havis sur la dorso?
-- 4778.
-- Chu ne la saman? Kial?
-- Tiu estis mia karesnomo.

RUZA VULPO

- Chasisto:
--Vulpo estas tre ruza besto.
--Chu ne nur lau la fabeloj?
-- Ne. Mi spertis. Mi pelis
tutan tagon vulpon de mateno
ghis vespero. Kiam mi fine
tamen sukcesis mortpafi ghin,
montrighis, ke ghi ne plu estis
jam vulpo, sed hundo.

EKURA STRIADO

- Vilagha kuracisto rapidege veturigas
la automobilon sur la chefstrato.
-- Atentu! Ne tiel rapide! -- diras la
edzino apud li. -- Haltigos kaj punos
nin la policisto.
-- Trankvilighu, ne timu. Hierau li
estis che mi, kaj mi malpermesis al li
forlasi la liton pro danghera malsano
tri tagojn.

Artikoloj pri Albanio kaj albanoj

Post 20 jaroj ...

En februaro albanoj festis per kanzon-koncertoj en la ĉefurbo Tirano kaj en aliaj lokoj la 20-jariĝon de la faligo de statuo de Enver Hoxha [hodĵa], unu el la lastaj diktatoroj en la orienta Eŭropo.

Tiam, en 1991, miloj da gestudentoj de la ŝtata universitato „Enver Hoxha” postulis, ke oni forigu la nomon de la diktatoro de ilia klerigejo. Ilin subtenis pli ol 100 000 ĉefurbanoj, aparte sindikatanoj. Intervenis la polico, sed la protestantoj sukcesis faligi la statuon. Ĝin ili tiris per kamiono tra la stratoj ĝis la studenta domaro. Al albanoj same gravas la faligo de la statuo kiel al germanoj la faligo de la berlina muro. Ĝi lanĉis novan eraon en tiu ĉi ekskomunisma lando.

Teroro

Mezaĝaj albanoj nun malame memoras sian iaman diktatoron kiel kapon de mafieca klano, kiu dum duonjarcento ekspluatis kaj turmentis tutan popolon. Oni kalkulas, ke dum la teroro komunisma estas persekutitaj, enprizonigitaj aŭ mortigitaj ĉ. 800 000 albanoj. Samopinias la juna generacio pro la rakontoj de siaj gepatroj. Poste, pro sia pasinteco, Albanio suferis longan transiran periodon. Triono de la albana popolo elmigris; restis tamen la idoj de iamaj komunistaj potenculoj, membroj ĝenerale de maldekstraj partioj, kiuj provas rekapti la povon. Ili uzas monon akiritan dum la komunisma reĝimo.

Pro la relativa malriĉeco kaj postrestanteco de la albana ekonomio, daŭre rimarkeblas korupto en la publika vivo. Tial la popolo iomete seniluziiĝas. Malgrandas esperoj pri la estonteco.

Modela kunlaboro

Pli da kunlaboro inter Albanio kaj Kosovo postulis la nova prezidanto de Kosovo, Behgjet Pacolli [behĝet pacoli], dum sia unua vizito al najbara Albanio. Parolante antaŭ albanaj deputitoj, Pacolli diris, ke la nova aŭtoŝoseo Kukës-Morinë Durrës, kiu kunligas la marbordon de Adriatiko kun Kosovo, estas unua paŝo. Tamen, li diris, nepras antaŭenmarŝi per pli grandaj paŝoj ekonomiaj, kulturaj kaj spiritaj. Varoj, kapitaloj, ideoj kaj homoj moviĝu libere inter la du landoj.

Elektro

Albanio kaj Kosovo tradicie subtenas unu la alian. Kosovo eksportas al Albanio cerealojn, viandaĵojn kaj elektron dum sekaj sezonoj; Albanio recipokas per legomoj, fruktoj, salo, laktaĵoj, olivoj kaj elektro dum la vintra periodo. Tiel eblus komuna elektroenergia sistemo, ankaŭ unuigitaj lernejoj, lernolibroj, sciencaj kaj oficialaj terminoj por ĉiaspecaj dokumentoj. Komuneco povus tuŝi ankaŭ Makedonion kaj Montenegron, almenaŭ en ekonomiaj sferoj. Tiamaniere, sekvante la modelon de Eŭropa Unio, ambaŭ landoj povus

sin pretigi pli bone kaj pli efike por iam aliĝi al EU.

Prezidantino elektita

Komence de aprilo elektigis en Kosovo prezidantino. Atifete Jahjaga, 36-jaraĝa, ricevis subtenon de 80 el 101 deputitoj en la parlamento. La antaŭa prezidanto, Behgjet Pacolli, estis malagnoskita de la konstitucia kortumo de Kosovo pro malregulaĵoj dum la elekto. Simile okazis al antaŭa prezidanto, Fatmir Sejdiu, kiu malregule retenis la postenon de partiestro. La novan prezidanton subtenis la ĉefaj partioj. Bojkotis ŝian elekton la partioj „Memdecido” kaj „Alianco por la Estonteco de Kosovo”, kiuj kredis, ke la elekto daŭrigos la vivon de registaro celanta „sovaĝe” privatigi poŝtajn, elektrajn kaj aliajn servojn.

Unuiga faktoro

La nova prezidanto, kiu deĵoris kiel vicdirektoro de la kosova polico kaj kiu trejniĝis en Anglio, Germanio kaj Usono, promesis esti unuiga faktoro en Kosovo kaj reprezenti ĉiujn civitanojn. Ŝi konsideris normala traktadon kun Serbio: tio stabiligos la regionon. Ŝi volas ankaŭ kunlabori kun Eŭropa Unio kaj Usono.

La parlamento same voĉdonis, por ke post unu jaro la popolo rekte elektu sian prezidanton.

Prokrastita dankemo

En la dua mondmilito Albanion eniris
britaj oficiroj por helpi organizi
la rezistadon kontraŭ la faŝismaj
invadintaj armeoj. Dum bataloj kontraŭ
la nazioj mortis 46 britaj oficiroj.
Post 1946 la registaro de Enver Hoxha
[hodĵa] rompis rilatojn kun Britio.
Oni ne memoris la helpon britan dum la
milito aŭ pentris ĝin nigra. Post 1990 estis
restarigitaj diplomatiaj rilatoj. Tiam
oni kreis memorigejon al la 46 britoj
falintaj en Albanio.
En majo, okaze de la tago de la venko
kontraŭ faŝismo, civitanoj de Tirano
omaĝis ĉe la memorigejo al la falintaj
britaj aliancanoj. Tion aranĝas ĉiujare
neregistaraj organizaĵoj de veteranoj, iamaj
persekutitoj politikaj, sindikatoj kaj
simplaj civitanoj.

KOSOVO

La marmora groto Gadime

La marmora groto Gadime estas la
sola ĉi-momente vizitebla el inter
dekoj da kavernoj en Kosovo.
Ĝi troviĝas je ĉirkaŭ 20 km sude de la
ĉefurbo Priŝtino. La groto estas vere mirinda
pro siaj belegaj stalagmitoj kaj stalaktitoj.
Tuj post la liberiĝo de Kosovo,
junie 1999, la aŭtoro plezure vizitis ĝin
trifoje kaj de tiam rekomendas ĝin al
vojaĝantoj.
La groto estis malkovrita tute hazarde
en la jaro 1969 de vilaĝano Ahmet
Asllani, kiu serĉis ŝtonojn por sia nova
domo. Li estis ŝokita de tio, kion li vidis
ene. Poste la groton esploris fakuloj el

la eksa Jugoslavio, aparte profesoro Jovan Petrović kaj speleologiaj kluboj el Vojvodino. Oni taksas ĝian aĝon je 80 milionoj da jaroj.

Ĝi kuŝas je 584 m super la marnivelo. La groto fariĝis vizitebla por turistoj en la jaro 1976. Ĝi longas 1500 m, sed eblas trarigardi nur 800 metrojn de unu el ĝiaj tri etaĝoj. Ene la temperaturo estas 9,6-16 °C. En ĝi estas lageto kun areo de 500 kvadrataj metroj, kaj je 6-10 m sube trafluas rivereto Klusure.

En la groto estas kelkaj ejoj. Unu el ili estas la „ejo de geamantoj”. Oni nomas ĝin tiel pro stalagmito kaj stalaktito „Romeo kaj Julieto”, alproksimiĝintaj unu al la alia je distanco de nur 5 cm.

Laŭ fakuloj ili povus tuŝi unu la alian nur post 1 500 000 jaroj, ĉar por 1 mm estas bezonataj 30 000 jaroj! Tre interesaj estas ankaŭ aliaj ejoj kaj koridoroj.

Sur la plafono de unu el ili troviĝas marmoraj elstaraĵoj, kiuj malgraŭ la gravito turniĝas supren! Neniu ĝis nun povas ekspliki tiun evoluon. Laŭ legendo leporo enveninta la groton eliris post kelkaj tagoj en Janjevo (apud Graĉanica) – loĝloko, situanta aerlinie je 12 km.

Antaŭ kelkaj jaroj oni komencis ĉerpi trinkeblan akvon el ĝi por la najbaraj vilaĝoj pere de pumpstacio. Karakteriza por la groto Gadime estas formacioj de marmoro kaj pluraj mineraloj, inter kiuj la rara mineralo aragonito.

(ĉerpitaj el Monato, julia numero)